

revuo

esperanto

junio 1965

58-a jaro

n-ro 715 (6)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 101 Antaŭ 20 jaroj (Lapenna)
Vienaj aŭguroj
- 102 La Homaj Rajtoj en la Universala Deklaracio
kaj Eŭropa Konvencio (Lapenna)
- 105 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 106 Koreujo: la lando de mateno kvieta (Kim)
- 108 Lerneja Bulteno n-ro 5:
Informado pri Eo kaj JIK en formo de lerneaj
prelegoj; Mallongaj sciigoj; Aldono al la listo
de rekomenditaj libroj
- 110 Kalevala: centro de la finna kulturo (Kalocsay)
- 112 Recenzoj
- 113 Ricevitaj eldonaĵoj
Nekrologoj Thollet, Dalmau, Burgler, Kossa
- 114 Mallongaj novaĵoj
Esperanta konkurso pri Malto
- 115 50-a Universala Kongreso, Tokio 1965
Kvar hajkoj (trad. Lobut)
Monda Kulturo (enhavo)
- 116 La Juna Vivo
- 117 En la grupoj
Esperanto en radio
Oficiala informilo n-ro 380
- 119 La internaciaj konkursoj 1965
Anoncetoj

kovrila bildo

"Edukado... kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj" — Sihamoni, reĝa filo de princo Norodom Sihanouk de Kamboĝo, kun ĉeĥa knabino dum vizito al Ĉeĥoslovakio. (Foto: Kubica). Vidu artikolon pri Homaj Rajtoj, p. 102.

bildojn liveris

- 103 Kontakto
- 105 Oomoto
- 107 Welt auf Reisen
- 110 kaj 111 Ateneum, Helsinki
- 114 Archer

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88 Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

ANTAŬ DUDEK JAROJ

La celo de tiuj ĉi kelkaj linioj certe ne estas prezenti la signifon kaj rolon de Unuiĝintaj Nacioj. Pri tio ekzistas abunda literaturo en multaj lingvoj. Artikoloj kaj studoj aperis ankaŭ en la Internacia. En diversaj okazoj, precipe en la ISU kaj en seminarioj organizitaj de UEA aŭ sub ĝia aŭspicio, prelegoj kaj diskutoj estis dediĉitaj al tiu temo.

Ni deziras aparte memori nur la historian eventon mem: la subskribon de la Ĉarto de UN la 26-an de Junio 1945.

La fondiĝon de UN kaŭzis du esencaj faktoj, unu negativa, la alia pozitiva. Al aro da malsukcesoj de la Ligo de Nacioj aldoniĝis la mortiga bato tiun tragikan tagon, kiam la naziaj armeoj invadis Pollandon. La sama tago, kiu signifis neniigon de la ĝistiamamonda politika strukturo, tamen jam enteniĝis la ĝermojn de pozitiva konstruado direktita al kreo de nova organizaĵo, pli vasta, pli universala kaj pli fortika ol la forpasinta.

La fondiĝon de UN kaŭzis du esencaj faktoj, plenaj jaroj da sangado kaj espero devis pasi inter la Londona Deklaracio de la 12-a de Junio 1941 kaj San Francisco. Unu dokumento viciĝis post la alia: La Atlantika Ĉarto de Aŭgusto 1941, la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj — konvena nomo trovita de Roosevelt — de la 1-a de Januaro 1942, la Moskva Deklaracio de Oktobro 1943, la Teherana Deklaracio de Decembro 1943, la Projekto de la Ĉarto ellaborita de la Konferenco en Dumbarton

Oaks en 1944, la principo de voĉdonado en la Konsilo de Sekureco interkonsentita en Februaro 1945. Ilin markas kuraĝo en la unuaj periodoj de defendo kaj retiriĝoj sur la batalkampoj, kaj firmeco en la lastaj fazoj, kiuj proksimigis la momenton de la venko.

Kvindek ŝtatoj estis reprezentitaj ĉe la Konferenco de San Francisco. Dum naŭ semajnoj, de la 25-a de Aprilo ĝis la 26-a de Junio, la Konferenco intense diskutis politikajn kaj jurajn problemojn surbaze de la Projekto akceptita en Dumbarton Oaks kaj la decidoj de Yalta. Multaj amendoj estis prezentitaj kaj pluraj ŝanĝoj faritaj. Fine naskiĝis la Ĉarto de la nova mondorganizo. La kvindek partoprenintaj ŝtatoj kaj Pollando, kiu ne povis ĉeesti, ĉar en tiu tempo ĝi ankoraŭ ne havis ĝenerale rekonitan registaron, estas konsiderataj kiel Membroj-Fondintoj de UN.

Pasis dudek jaroj. Intertempe la membraro pli ol duobliĝis. La Organizaĵo frontis gravajn krizojn. Ne malofte la esperoj perfidis, sed aliflanke estus maljuste nei ĝiajn sukcesojn. Ankaŭ nun UN troviĝas en tre malfacila situacio. Des pli ĝi bezonas la apogon de ĉiuj, kiuj komprenas, ke estas pli bone havi mondan organizaĵon eĉ kun organizaj kaj aliaj mankoj, ol tute ne havi ĝin. En la nuna Jaro de Internacia Kunlaboro ni subtenu ĝin per ĉiufanka progresigo de interpopola kaj interhoma kompreniĝo.

Ivo Lapenna

VIENAJ AŬGUROJ

Dum ĉies okuloj turniĝas kun speciala interesiĝo kaj espero al la unua Universala Kongreso en Azio, centoj da eŭropanoj, kiuj pro unu aŭ alia kaŭzo ne povas mem ĉeesti la aranĝojn en Tokio, jam preparas sin por alia renkontiĝo: la Eŭropa Esperanto-Konferenco en Vieno. Kiel komprenigas ĝia titolo, la E.E.K., sub aŭspicio de UEA, celas fariĝi la ĉefa fokuso de la eŭropa Esperanto-movado dum la ĉijara feria periodo. Jam laŭ la ĝisnunaj aliĝoj — el dudeko da nacioj — ĝi proksimiĝas al tiu ambicio.


Laŭ la lastaj informoj, 48-paĝa dua bulteno de la Konferenco estas nun presata. Ĝi prezentos, por la semajno de 11 ĝis 17 julio, ampleksan programon el filmoj, prelegoj, fakaj kunvenoj... mallonge, la plimulton el tio, kion la kongresa publiko kutime atendas. Kiel variaĵoj laŭ la temo "Esperanto en la praktikon" okazos prelegoj de prof. d-ro I. Lapenna pri "Lingvaj problemoj en la internacia politiko", de prof. L. Laurat el Parizo pri "Esperanto en ekonomi-politikaj rilatoj", de s-ro H. Steiner pri "Esperanto en la literaturo" kaj de s-ro E. Werner pri "Esperanto kaj la turismo". S-ro E. L. M. Wensing kontribuos skriban raporton pri "Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj".

Je la distra flanko de la programo staras prezentoj de la filmo "Angoroj" kaj aliaj, vizitoj al la Internacia Esperanto-Muzeo kaj al la Zamenhof-monumento, fortepiana koncerto, programo de finnaj popolkantoj kaj aliaj muzikaj eroj, fotokonkurso kun premioj de minimume 3500 steloj, balo, ekskursoj, ktp.

Apartaj fakaj kunsidoj estas aranĝitaj por eldonistoj, eŭropfederalistoj, ŝakistoj, fotistoj, instruistoj, sciencistoj, katolikoj, arkitektoj kaj militrezistantoj.

Kiel kutime, la signifo de tiu ĉi Konferenco troviĝas ne nur en ĝia interna laboro kaj utilo sed ankaŭ en ĝia efiko kiel manifestacio al la vasta publiko. Tial estas kontentige konstati, kian gravecon ekhavis la aranĝoj el vidpunkto de la aŭstra publiko: en la Honoran Komitaton akceptis aniĝi la ĉefministro d-ro Klaus, 6 aliaj ministroj, la urbestro de Vieno, krom episkopoj, rektoroj de universitatoj kaj aliaj. Ankaŭ diversaj turismaj instancoj reagis favore per eldono de esperantlingvaj materialoj. Siavice, ĉio ĉi havis vigligan efikon je la Esperanto-movado en Aŭstrujo, kies centra organo nun aperas denove en presita formo, kies junulara sekcio aranĝas internacian renkontiĝon en junio, kaj kiu ĝenerale montras kreskantan aktivecon. Bonaj aŭguroj!

esperanto
junio 1965



en la jaro de
internacia kunlaboro

Prof. d-ro I. Lapenna:

LA HOMAJ RAJTOJ

EN LA UNIVERSALA DEKLARACIO KAJ EŬROPA KONVENCIO



I. La Universala Deklaracio

Antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio, la jura situacio prezentiĝis jene: sur nacia kampo la internaj juraj sistemoj, ĝenerale parolante, rekonis la homajn rajtojn en pli aŭ malpli alta grado; sur internacia kampo la Ĉarto de U.N. solene proklamis la fidon je tiuj rajtoj, dum la packontraktoj de 1947 devigis 5 ŝtatojn rekonu kaj observi iujn el la menciitaj rajtoj.

La Ĉarto, tamen, nenie difinis precize la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. Ekestis, do, la demando, kion oni devas konsideri kiel homajn rajtojn kaj liberecojn; kiuj, fakte, estas tiuj rajtoj kaj liberecoj. La respondo al tiu demando donas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita de la Ĝenerala Asembleo de U.N. la 10-an de decembro 1948, per 48 voĉoj, neniun kontraŭ kaj 10 sindetenojn.

La Universala Deklaracio havas solenan Enkondukon kaj 30 artikolojn. La unua parto de la teksto mem (art. 1-21) rilatas al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj: malpermeso de sklaveco aŭ servuteco; malpermeso de torturoj aŭ nehumanaj punoj; rajto je jura personeco; plena egaleco antaŭ la leĝo; malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj aŭ ekziloj; egaleco antaŭ la kortumoj kaj publikado de la procesoj, sendependeco kaj senpartieco de la juĝistoj; supozo de senkulpeco antaŭ ol la krimo estas pruvita; principo "neniu krimo, neniun puno sen la leĝo"; malpermeso de arbitra enmiksiĝo en la privatajn aferojn, familion, hejmon aŭ korespondadon; libereco de moviĝo en sia propra lando kaj en eksterlando; rajto je azilo; rajto je ŝtataneco kaj rajto ŝanĝi ŝtatancon; rajto geedziĝi kaj formi familion; libereco de pensado, konscienco, religio, opinio kaj esprimado, organiziĝo kaj kunvenado; rajto partopreni ĉu rekte ĉu pere de libere elektitaj reprezentantoj en la regado de sia lando; universala kaj egala voĉdona rajto por ĉiuj; regulaj periodaj kaj sekretaj elektoj.


La dua parto (art. 22-27) proklamas la modernajn liberecojn kaj rajtojn. Temas pri difinitaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, necesaj al la homa digno kaj por la libera evoluo de la homa personeco: rajtoj al laboro, al egala kompenso por egala laboro, al organiziĝo en laboristaj sindikatoj, al ripozo, socia asekuro kaj vivnivelo sufiĉa por certigi la bonfarton kaj sanon de la persono kaj de liaj familianoj, rajto al senpaga elementa edukigo kaj al egala atingeblo de la supera edukigo, rajto al libera partopreno en la kultura vivo, al ĝuado de artaj valoroj kaj al profitado de la progresoj de la scienco.

La lastaj tri artikoloj havas konkludan karakteron.

El formale jura vidpunkto la Universala Deklaracio havas karakteron de rekomendo kaj, kiel tia, ĝi ne estas deviga. Tamen, se oni analizas ĝin en ligo kun la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj kun la teorio pri fontoj de Internacia Publika Juro, ĝia enhavo estas deviga. Tri argumentoj favoras tiun koncepton:

Unue, la Ĉarto de U.N., kiu sendube havas devigan karakteron por ĉiuj Ŝtatoj-Membroj, plurloke eksplicite rekonas la ekziston de fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Tio signifas, ke la Internacia Juro de U.N. rekonas la juran ekziston de la homaj rajtoj kaj sekve la malobservo de tiuj rajtoj devas esti konsiderata kiel rompo de ĝia regulo. Ĉar la Deklaracio estas logike kaj organike ligita al la Ĉarto, ĝi precizigas tion, kio, laŭ la Ĉarto, jam estas deviga parto de Internacia Juro.

Due, unu el la fontoj de Internacia Juro estas la t.n. ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. La Universala Deklaracio efektive koncize resumas la ĝeneralajn jurajn principojn, rekonitajn de la civilizitaj nacioj, sur la kampo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Se, sen tiaspeca deklaracio, povus ekesti duboj pri la demando ĉu iu rajto estas fakte rekonita de la civilizitaj nacioj, nun, post la proklamo de la Deklaracio,



La Ĝenerala Asembleo
de Unuiĝintaj Nacioj

tiaj duboj ne povas ekzisti.

Fine, grava helprimedo por la konstato de Internacia Juro estas la kortumaj decidoj kaj la teoriaj verkoj de la plej gravaj fakuloj. Se do teoria verko de konata fakulo povas esti uzata kiel rimedo por konstati aŭ por interpreti iun juran regulon, des pli povas esti utiligata tiel grava dokumento, verko ne de unu fakulo, sed de granda nombro da oficialaj ŝtataj reprezentantoj kaj de fakuloj apartenantaj al ĉiuj juraj sistemoj de la mondo. Do, ankaŭ laŭ tiu vojo la enhavo de la Deklaracio fariĝas deviga.

II. La Eŭropa Konvencio

En 1948, do en la sama jaro, en kiu estis proklamita la Universala Deklaracio, kunvenis en Hago Kongreso de la Eŭropa Movado sub la prezido de Winston Churchill kaj en la ĉeesto de Reĝino Juliana kaj de nombro da eminentuloj el eŭropaj landoj. La Kongreso iniciatis la kreon de Eŭropa Konsilantaro kaj akcentis, ke unu el la celoj de la Konsilantaro devus esti la protekto de la Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj. La propono pri la homaj rajtoj enhavis jenajn esencajn punktojn:

(i) Antaŭkondiĉo por membreco en la Eŭropa Konsilantaro devus esti la rekono de la homaj rajtoj: la ŝtatoj devus subskribi ian deklaron, kiu garantius la fundamentajn personajn kaj civitanajn rajtojn kiel postulaton de demokratio.

(ii) Ĉiuj ŝtatoj devus rekoni la aŭtoritaton de la Eŭropa Konsilantaro por la efektivigo de la rekonitaj rajtoj.

(iii) Sendependa Kortumo devus esti kreita kaj ĉiu Ŝtato-Membro devus havi la eblecon turni sin al ĝi, se kiu ajn el la rajtoj ne estas observata.

(iv) La Kortumo devus havi la povon esplori la plendojn ankaŭ surloke pere de siaj reprezentantoj en ĉiuj gravaj demandoj, ekzemple en kazoj de politikaj procesoj aŭ politikaj elektoj.

Post la fondiĝo de la Eŭropa Konsilantaro en 1949, la Eŭropa Konvencio estis subskribita en Romo la 4-an de novembro 1950.

Laŭ la originala propono de la Konsulta Asembleo, 10 rajtoj devis esti inkluzivitaj en la Konvencio. Tiuj rajtoj estis nur listigitaj, same kiel en la Universala Deklaracio, sed ne difinitaj. Precize la demando pri la difinado de la rajtoj elvokis grandajn diskutojn en la diversaj instancoj, kiuj pritraktis la demandon, tute speciale en la Komitato de juraj ekspertoj. Esprimiĝis ĉefe du starpunktoj.

La unua pledis por la nura listigo de la rajtoj, tiel ke la leĝdonaj organoj de la Ŝtatoj-Membroj havus la eblecon — kaj liberecon, kompreneble — difini ilin konforme al la internaj bezonoj kaj la konceptoj de la propra jura scienco.

La alia skolo prave argumentis, ke en konvencio oni devas precize difini la protektatajn rajtojn kaj la permesitajn limigojn, por ke ĉiu ŝtato klare vidu ĉu la interna leĝaro estas konforma al la sindevigoj akceptitaj per la konvencio kaj por ke ĝi povu, se necese, adapti siajn leĝojn al la preskriboj de la konvencio.

La fina teksto de la Eŭropa Konvencio enhavas kompromisan formulon: ĝi kaj listigas kaj difinas la rajtojn, kio praktike tamen signifas, ke la dua starpunkto havis pli da pezo en la finredaktado.

Grava estis la demando pri la aplikotaj metodoj por certigi la plenumon de la Konvencio. La registaroj de la Ŝtatoj-Membroj akceptis la ideon de la Eŭropa Asembleo, ke aparta komisiono devus esti formita kiel internacia organo, al kiu la Ŝtatoj-Membroj povos plendi, se la rajtoj difinitaj en la Konvencio ne estos observataj.

Tiu ideo trovis eĉon en la Tria Parto de la Konvencio, kiu en 17 artikoloj (art. 20-37) difinas la rolon kaj funkciadon de la Eŭropa Komisiono pri la Homaj Rajtoj. La tasko de la Komisiono estas esplori ĉiujn malobservojn de la Konvencio. Por ke ĝi povu plenumi kiel

eble plej sukcese tiun taskon, la Ŝtatoj-Membroj devigis sin havigi al ĝi ĉiujn necesajn faciligojn kaj, se iel eble, solvi amike la malkonsenton. La Komisiono devas sendi sian raporton al la Komitato de Ministroj kaj fari proponojn, kiujn ĝi opinias taŭgaj por solvi la konfliktojn. Laŭ la Konvencio, la Ŝtatoj-Membroj devigis sin akcepti la decidojn de la Komitato de Ministroj.

Ĉio ĝis nun dirita koncernis la rilatojn inter la Ŝtatoj mem, kiuj povas plendi unu kontraŭ la alia al la Komisiono pro malobservo de la Konvencio. Sed jam delonge sentiĝis la bezono rajtigi ankaŭ la individuon postuli protekton de siaj rekonitaj rajtoj antaŭ internacia organo kontraŭ sia propra ŝtato. La Eŭropa Konvencio estas la unua internacia akto en la tuta historio de Internacia Juro, kiu donas al la individuo tiun rajton sub difinitaj kondiĉoj. La afero, kompreneble, ne evoluis glate. Estis fortaj kontraŭstaroj. Fine oni akceptis kompromisan solvon, kiu estas formulita en la art. 25 de la Konvencio. Laŭ tiu artikolo ĉiu individua persono, privata organizaĵo aŭ grupo da unuopuloj, kiuj asertas, ke ili estas viktimoj de malobservo de la rajtoj difinitaj en la Konvencio fare de kiu ajn Ŝtato-Membro, povas plendi al la Komisiono, sed nur sub la kondiĉo, ke la koncerna ŝtato anticipe deklaris, ke ĝi akceptas la kompetentecon de la Komisiono por tiaspecaj privataj plendoj.

En la unuaj 4 jaroj preskaŭ 700 individuaj peticioj estis prezentitaj al la Komisiono kaj novaj peticioj-plendoj estas daŭre prezentataj.

La unua individua kazo estis tiu de Lawless — nomo, kiu laŭ stranga koincido signifas "senrajta" — kontraŭ Irlando pro malliberigo sen juĝa proceso de suspektata membro de la Irlanda Respublika Armeo. Tiu kazo estis deklarita allasebla. Aliaj gravaj kazoj estis tiuj de Greklando kontraŭ Britujo pro eventoj en Cipro, sed la proceduro estis haltigita post la interkonsentoj de Zŭrich kaj Londono kiuj solvis la t.n. Cipran demandon.

Kiel oni vidas, la Eŭropa Konvencio konsistas efektive el 3 ĉefaj partoj. La unua listigas kaj difinas la homajn rajtojn; la dua pritraktas la internaciajn organojn por protekto de la rekonitaj rajtoj, dum la tria rilatas al kelkaj teknikaj demandoj, ekzemple la kostoj, la privilegioj kaj imuneco de la membroj de la Komisiono kaj Kortumo kaj pluraj aliaj.

III. Konkludo

Malgraŭ la koncizeco de tiu ĉi prezento, klare vidiĝas la esencaj diferencoj inter la Universala Deklaracio kaj la Eŭropa Konvencio. La ĉefaj povas esti resumitaj jene:

La unua okulfrapa diferenco inter la du dokumentoj estas, ke la Universala Deklaracio nur abstrakte listigas la fundamentajn homajn rajtojn kaj liberecojn, dum la Eŭropa Konvencio ne nur listigas ilin, sed ankaŭ difinas la unuopajn rajtojn kaj liberecojn en la plimulto de la kazoj, precizigante samtempe la

eblecojn jure limigi ilin.

Plue, el formale-jura vidpunkto, la Universala Deklaracio, kiel la nomo mem diras, estas deklaro de principoj kaj ne interŝtata konvencio. Tial, kiel dirite pli frue, la Universala Deklaracio estas el formale-jura vidpunkto nur rekomendo, do nedeviga por la Ŝtatoj-Membroj de U.N., kvankam el vidpunkto de sia enhavo, tamen deviga laŭ la malrektaj vojoj prezentitaj. Male, la Eŭropa Konvencio estas internacia interkonsento, egala al kiu ajn alia interŝtata traktato, kaj tial deviga por ĉiuj ŝtatoj, kiuj subskribis kaj ratifis ĝin.


Trie, malantaŭ la Universala Deklaracio ne troviĝas internacia aparato kiel instrumento de garantio por la realigo de la homaj rajtoj kaj liberecoj rekonitaj en la Deklaracio. La dua antaŭvidita etapo, nome la subskribo de Internacia Pakto por protekto de la rajtoj rekonitaj en la Universala Deklaracio, ankoraŭ ne estas ellaborita kaj estas demando kiam la ideo povos esti realigita. Male, la Eŭropa Konvencio antaŭvidis internaciajn organojn — la Komisionon kaj la Kortumon — por internacia protekto de la homaj rajtoj, kaj tiuj organoj jam ekfunkciis. Eĉ pli la Eŭropa Konvencio donis la rajton de peticio-plendo ankaŭ al unuopuloj kaj al privataj organizaĵoj en difinitaj kazoj, kio signifas grandegan paŝon antaŭen sur tiu ĉi kampo.

Temas pri efektive grandaj kaj esencaj diferencoj. La homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas hodiaŭ rekonitaj kiel tiaj ĉie en la mondo, sed nur en Eŭropo tiuj rekonitaj rajtoj estas ankaŭ protektataj, tra internacia konvencio, de internaciaj organoj. La akiroj atingitaj en la sino de la Eŭropa Konsilantaro, resp. en la ŝtatoj apartenantaj al tiu organizaĵo, estis eblaj pro la esence identaj aŭ tre similaj ŝtataj strukturoj, politikaj sistemoj, kulturaj valoroj, ideologiaj fonoj, tradicioj kaj aspiroj. La progresiva egaligado de la vivnivelo, la amasiĝado de personaj kontaktoj kaj interŝanĝado de ideoj trans la landlimoj, la konscia disvastigado de la principoj entenataj en la Universala Deklaracio preparas la vojon por la kreo de mondaj instancoj kaj proceduroj, kiuj, simile al la eŭropaj, protektos la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn ĉie en la mondo. La unua paŝo jam estas farita; la egaleco de la homoj, senkonsidere al iliaj rasa, nacia, religia aŭ socia apartenoj, estas rekonita en unuaranga dokumento kun universala, tutmonda karaktero. El tiu rekono necese sekvas, ke pli aŭ malpli baldaŭ, espereble tre baldaŭ, la rajtoj kaj liberecoj solene proklamitaj en tiaspeca dokumento, estos ankaŭ efektive observataj kaj protektataj. Al atingo de tiu celo povas kaj devas kontribui ĉiu, kiu rigardas kaj vidas en sia kunestulo homon plene egalan al si mem, kiu tial devas ne nur havi, sed ankaŭ ĝui en ĉiu ajn angulo de la terglobo la samajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn.

(Koncizigita teksto de prelego en la Internacia Somera Universitato, Hago, 1964)



Dum rondvojaĝo de s-ino Edna M. Cox en Japanujo subskribis i.a. la urbestro de Miyazaki.



la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto

LASTAJ PROGRESOJ DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO

Cent dudek mil

Post longa periodo de "varmiĝado" la kampanjo por kolekti subskribojn por la Propono al U.N. nun swingiĝas supren. Per la unuaj 120 000 individuaj subskriboj el 45 landoj ĝi jam atingis tian punkton, kiam la informaj fakoj kaj la individuaj membroj povas sin turni al la alilingva gazetaro kun raportoj, ne nur pri la celoj de la kampanjo, sed pri la unuaj konkretaj rezultoj, emfazante tamen, ke ja temas nur pri la unuaj rezultoj. Jam ne neglektebla estas la nombro de organizaĵoj subskribintaj: 583 en 24 landoj, kun entute ĉ. 9.000.000 membroj. Inter ili la plej gravaj novaj estas la Flandra Ligo de Turistoj kaj Aŭtistoj (104 386), la belga "Bond zonder Naam" (110 000), kvin svedaj fervojistaj organizaĵoj (kune 179 000) kaj la Schweizer Reisekasse (Svisa Vojaĝokaso — 240 000 anoj).

Eminentuloj el ĉiuj medioj

En longa listo de novaj subskribintoj-eminentuloj elstaras la nomoj de Sven Andersson, sveda ministro de defendo, Per Hækkerup, dana ministro de eksterlandaj aferoj, Diko Dikov, bulgara ministro de internaj aferoj kaj Ryoichi Nagata, japana vic-ministro de eksterlandaj aferoj. Aliaj elstaraj figuroj de la politika vivo estas s-ro Achille Van-Acker, prezidanto de la belga ĉambro de deputitoj kaj honora ministro, d-ro Heinrich Gleissner, estro de Supra Aŭstrio, s-ro Hans Bögl, estro de Burgenland, Aŭstrio, kaj s-ro George Zammit, verkisto kaj prezidanto de la

Kristana Laborista Partio de Malto.

Grava por la varbado en religiaj medioj estas la subskribo de Kiril, patriarko de la bulgara eklezio. Inter la 68 urbestroj ĝis nun varbitaj troviĝas ankaŭ tiuj de Bruselo kaj Brugge, kaj de Hannover. Ankaŭ en Japanujo, dank' al speciala vojaĝo de ses personoj sub aŭspicio de Oomoto, nombro da lokaj eminentuloj aliĝis al la Propono. Aliaj konataj figuroj: la plej fama vivanta hungara skulptisto Zsigmond Kisfaludi Strobl; la dua prezidanto de la sveda ĉefsindikato de la sindikataro, Herman Blomgren; s-ro Rob. Hayem, sekretario de la komerca ĉambro belga-germana en Bruselo; kaj ankoraŭ aro da aliaj gravaj personoj de la belga trafiko kaj turismo.

Kvardek sep svedaj parlamentanoj

Lige kun la decido de la sveda parlamento iniciati agadon pri la monda lingva problemo ĉe U.N. aŭ Unesko, ne estas surprize, ke jam 47 svedaj parlamentanoj subskribis ankaŭ la Proponon de UEA. Krome troviĝas, inter la multegaj parlamentanoj varbitaj en diversaj landoj, pliaj danaj (el ĉiuj partioj), bulgaraj, maltaj, belgaj, aŭstraj kaj aliaj. En Danlando jam 18 eminentuloj subskribis ankaŭ la specialan deklaron presitan en nia decembra eldono.

Kiel oni vidas, la listo estas sufiĉe impona por interesi ĉiujn ĵurnalistojn (vidu ankaŭ la antaŭajn informojn sub ĉi tiu rubriko). Nun necesas plene ekspluati la atingaĵojn.

esperanto
junio 1965

korea
desegnisto
pilgrimas
tra la
lando

KOREUJO

LA LANDO DE MATENO KVIETA

*En la orepoko de Azio
ankaŭ Koreujo portis lampon. —
Nun la lamp' atendas rebruligon,
ilumine al la Oriento.*

(Rabindranath Thakur)



Koreujo estas paradizo por alilandaj turistoj, kiuj deziras serĉi delikatajn diverskolorajn vidindaĵojn kaj gustumi fremde misterajn vivspertojn en bela kaj ekzotika lando. Jen staras modernaj magazenoj preskaŭ flanke-ĉeflanke kun antikvaj temploj; la turoj de oficejaj konstruaĵoj super la muroj kaj pordoj, kiuj defendis la urbon en malnova tempo; la Parlamento de moderna Koreujo en la distanco de ŝtonjeto el pompa palaco de antaŭaj reĝodinastioj. Jen estas mondo nova kaj nekonata al alilandaj turistoj por plene ĝui kaj plene sin kontentigi — la loko, kie oriento renkontas okcidenton en la ekscita kunmikso de ambaŭ kulturoj; la loko, kie amikeco kaj afableco ne estas kalkulataj kaj mezurataj en mono. *Kial ne viziti Koreujon, la "Lando de Orientlumo" kaj la "Lando de mateno kvieta", survoje aŭ okaze de la Tokia Kongreso?*

Koreujo estis "Ermita Reĝolando" de la antaŭaj generacioj, kaj tial alilandanoj neniam estis bonvenaj. Kiam la mondo ĉie urĝis sin por modernigo, Koreujo intence fermis la okulojn kontraŭ tiu fenomeno kaj fariĝis "La mistera enigma lando" malantaŭ ermita kurteno. Sed en la hodiaŭa spactrafikepoko, Koreujo jam delonge larĝe malfermis sian pordon al la ekstera mondo kaj montras sian tradicion gastamon kaj bonvenigon al alilandanoj. Koreujo situas en la distanco de 90 minutoj de flugado el Tokio kaj Hongkongo, kaj en Seulo, metropolo kun tri milionoj da enloĝantoj, troviĝas internacia aerodromo, tra kiu ĉiutage flugas aeroplanoj de CAT, NWA, BOAC, Air France, Lufthansa, Swissair, China

PA, Japan AL, ktp, kaj tial oni el kiu ajn mondparto povas tute facile atingi Koreujon, kaj, krome, Koreujo donas la rajton al turistoj alilandaj resti dum 72 horoj sen la enirvizo.

☆

Lando. La korea duoninsulo kuŝas sude de la nordorienta parto de la azia kontinento. La tuta duoninsulo estas longa 500 mejlojn kaj havas 84 942 kvadratmejlajn da areo. Sudoriente en la Pacifiko kuŝas Japanujo; norde limas Mangurujo de Ĉinujo.

☆

Popolo. Koreoj estas rase diferencaj de aliaj orientaj popoloj. Koreoj estas la posteularo de migranta tribo el Centra Azio kaj Kaŭkazo, kaj en ili kombiniĝas multe de la karakterizoj de la rasoj kaŭkaza kaj mongola. Fizike, koreoj estas ĝenerale pli altaj kaj fortaj ol la pli multaj orientanoj. La popolo konservas tre belan kostumon tra la generacioj, kaj eĉ hodiaŭ oni facile povas trovi ĝin de loko al loko sur la stratoj. Sed ordinare oni portas eŭropstilajn vestojn.

☆

Lingvo. La korea lingvo apartenas al la altaja segmento de la ural-altaja lingvogrupo. La korea alfabeto nomata "Hangul" estas tiel same simpla, facile lernebla sistemo de fonetikaj simboloj kiel la esperanta. Hanguloj ne estas silabaj kiel la japanaj kanaoj, kaj havas ĉiam ĉiu litero saman sonon. La gramatiko estas plejparte sama aŭ almenaŭ simila al tiu de Esperanto. La akuzativo, prefiksoj kaj sufiksoj kaj vortfarado estas samaj.


Religio. La religioj, kiuj ludis kaj ludas gravan rolon en Koreujo, estas Budhismo, Konfucianismo kaj Kristanismo (laŭvice de enkonduko-dato). Budhistoj estas nombre regantaj. La etika koncepto de Konfucio ankoraŭ vaste influas super multaj koreoj. Kristanismo estas lastatempe rapide disvastigita, kaj oni trovas multajn preĝejojn tie kaj tie.

☆

Klimato. La somero komenciĝas en junio kaj finiĝas en la komenco de septembro. La meza temperaturo de somero estas 78,8° F (26° C), sed la pinto de la somero ofte atingas ĉ. 90° F (32,2 C). Pluva sezono ĝenerale vizitas Koreujon ĉ. fine de julio kaj daŭras dum 2 semajnoj. Surporti sporto-ĉemizon kaj malpezan veston estas la komuna etiketo dum la somero. Printempo kaj aŭtuno estas la plej plezuraj sezonoj en Koreujo. La temperaturo tiam estas ĉ. 70 gradoj (21° C), kaj precipe aŭtune la pejzaĝo estas treege bela kaj impona.

☆

Historio. Koreujo apartenas al la landoj, kie plenfloris civilizacio alta en prahistorio. La nacio estis fondita jam antaŭ 4298 jaroj, multe pli frue ol la japana, malpli ol la ĉina (2333 a.K.). Antikvaj koreoj ĝuis altan kulturon kaj civilizon kaj ĝin transinstruis al japanoj antikvaj trans la maro. Tiam japanoj eldormiĝis kaj komencis kompreni kio estas kulturo kaj civilizo. Ili starigis monumenton por honorigi kaj memorigi korean transinstruon, kaj fondis vilaĝon por koreaj sciencistoj, artistoj kaj bonzoj kun la nomo Bekĝe, kiu estis la nomo de tiama reĝodinastio, kaj tiuj ankoraŭ hodiaŭ troviĝas en Nara, Japanujo. Koreoj estis konservativaj, kaj tial ne ŝanĝiĝis la vivmaniero tra la jarcentoj. Adorante la tra-



En koreaj vilaĝoj la loka tribunalo ofte kunsidis antaŭ la oficiala domo anstataŭ en ĝi. Rimarku la tradiciajn cilindrajn ĉapelojn.



Vilao Hjang-Uon sub neĝo.


dicion kaj longhistorion, la kontakton kun eksterlandanoj oni malestimis, kaj kun fiero oni fermis la pordon de la lando al la ekstera mondo. "Ermita Kurteno" forte malleviĝis, kaj koreoj ne sciis kio estas farata ekster la kurteno, samkiel rano en mallarĝa puto. En la kadro de sia lando, ĝuante pacan, trankvilan kaj liberan vivon, tiam koreoj estis sufiĉe kontentaj kaj feliĉaj pri si mem. Komence de la 20-a jarcento, kiam la mondo ŝveliĝis tie kaj tie pro akra strebado por sia profito, Japanujo invadis kaj koloniigis Koreujon. Post la fino de la 2-a Mondmilito kaj la forfalo de japana militismo "Respubliko Koreujo" estis starigita per ĝenerala voĉdonado sub la inspekto de U.N. Malfeliĉe, eksplodis milito en 1950. La milito forrabis kaj forbruligis ĉion ne nur materialan sed ankaŭ animan kaj tute ruinigis la landon kaj koron de Koreujo. Jam forpasis 12 jaroj de post la milito, kaj nun ĉio en Koreujo ŝanĝiĝis, pliguste pliprosperigis kaj progresis ol antaŭmilito, kaj unuavide oni trovas ne facile la vundojn de la milito.

☆

Por vizitantoj: Seulo estas la ĉefurbo de la Respubliko Koreujo, kaj samtempe la centro de la kulturo, edukado, komerco kaj politiko. La urbo estis fondita en 1392. En Seulo troviĝas multaj valoraj kulturheredaĵoj, kaj ili allogas la turistojn. KOREA ESPERANTO-SOCIETO (vidu Jarlibro 1965/I, p. 35) bonvenigas vizitojn de alilandanoj kaj jam estas preta disponigi senpagan gvidanton al vizitantoj. Ne morgaŭ sed hodiaŭ sin anoncu interesitoj!

Taekeng Kim

**esperanto
junio 1965**



INFORMADO PRI ESPERANTO KAJ JIK EN FORMO DE LERNEJAJ PRELEGOJ

red.: s-ro J. Toczyski

En informado pri Esperanto oni ne povas tute preterlasi la avantaĝon, kiun donas lernejaj prelegoj. Agemaj esperantistoj bone konas tiun formon de varbado kaj informado. En la laborplano de UEA okaze de JIK en II ĉapitro (d) ii ni legas:

"Por Profesoroj kaj Instruistoj. Memorigi la JIK en konvena formo en kadro de prelegoj aŭ instruhoroj en la universitatoj kaj lernejoj." Estas tute kompreneble, ke ne temas tie ĉi nur pri prelegoj fakaj, dum kiuj estas inde menciigi pri JIK en alloga kaj interesa formo, sed la aŭtoroj de tiu laborplano tutcerte pensis ankaŭ pri specialaj prelegoj entute dediĉitaj je tiu temo. La lernantoj estas la plej bonaj propagandistoj en siaj medioj kaj en siaj hejmoj. Tio, kion ni diris dum la prelego estos centfoje ripetita kun juna fervoro kaj entuziasmo. Junaj koroj facile ekflamas kaj ofte scipovas esti fidelaj kaj persistemaj. Mi ofte spertis, ke gravuloj, kiuj estis apogantoj de niaj poresperantaj klopodoj kaj eĉ helpantoj al la movado, en momento de sincereco konfesis, ke ili dum sia juneco aŭskultis ian konvinkan prelegon pri Esperanto kaj la bona, forta impresoj restis ĉe ili ĝis hodiaŭ. Multaj konas bone la valoron de tiuj prelegoj pri Esperanto kaj batalas pri ilia aranĝo kiel eble plej ofta. Jen kion skribas pri ili sinjoro M. Lewin el Dunstable en Anglujo:

"Por prepari la sojlon por ĝenerala instruado de Esperanto en lernejoj mi proponas kampanjon por doni po unu informa prelego pri Esperanto ĉiujare en ĉiu mezgranda lernejo kaj kolegio en la lando, prefere al iliaj altgradaj klasoj.

Ĉar temas nur pri unu prelego jare libervole donata dum posttagmeza periodo, lernejestroj pli facile donos sian konsenton kaj laŭ miaj spertoj ili eĉ bonvenigos la proponon. Mi mem komencis tiun laboron dum 1962 kaj prelegis en multaj mezlernejoj kaj kolegioj kun aŭskultantaro inter 30 kaj 150 personoj kutime kun ĉeesto de instruistoj kaj kelkfoje de la lernejestro. Senescepte mi elvokis entuziasman aprobon de la lernejoj kaj dankon de la estro.

Ĉar mi ne posedas aŭtomobilon, nur eblis prizorgi lernejojn en mia apuda distrikto. Tio ja estas tro granda laboro por unuopulo. Granda nombro da prelegantoj estas necesa por efike kovri la diversajn distriktojn de la tuta lando, kaj ilin trovi kaj organizi estas la unua nia tasko. Jen serioza okazo utiligi la servojn de la anoj de nia SBET. Almenaŭ en sia propra lernejo ĉiu instruisto devus unufoje jare doni tiun servon. Li ja estas en la plej bona pozicio eltrovi la oportunan

tempon kaj la rimedojn por ĝin fari, kaj diversloke verŝajne troviĝos spertaj esperantistoj, kiuj estos pretaj, se necese, helpi.

Eble, eĉ se ekzistas loka esperantista instruisto, estas rekomendinde venigi eksteran parolanton por doni la enkondukan informan paroladon. Eble utilos, ke mi ĉisube detaligu kelkajn el miaj spertoj ne kiel modelo sed nur kiel ekzemplo de la farenda laboro.

1. Mi neniam proponis min, ĉu persone ĉu letere, al nekonata lernejestro. Preferinde oni agu pere de konato, eble membro de la lernejestraro aŭ per ano de la asocio de gepatroj kaj instruistoj. Mi ofte parolas pri Esperanto al Rotariaj Klubo kaj kun ilia helpo mi ricevas invitojn de rotariaj instruistoj alparoli iliajn lernejojn.
2. Ne estas konsilinde paroli al junuloj en popollernejoj por ilin amuzi. Mi parolas nur al la altgradaj klasoj de mezlernejoj kaj kolegioj... En la lastnolitaj oni traktu la temon sufiĉe serioze por elvoki kritikan diskuton. Universitatoj devas esti traktataj ĉefe de la studentoj mem. Londono kun siaj centoj da lernejoj kaj multaj esperantistoj meritas specifan laboron.
3. Pli konvenaj ŝajnas aŭ la komencaj semajnoj de la lerneja jaro aŭ la postekzamena semajno. Post la fino mi disvendadas ŝlosilojn kaj "Esperanto for Beginners". Mi disvendis multajn centojn de tiuj malkaraj libretoj.
4. Foje instruistoj ankaŭ ekinteresiĝas kaj utilas alparoli ilin individue instigante studi Esperanton por venontjare entrepreni la instruadon en ilia propra lernejo."

La rimarkoj de sinjoro Lewin estas sendube tre valoraj, kaj ĉiu instruisto certe konsentas kun liaj konkludoj. Ili estas des pli valoraj, ke ni devas esti preparitaj morale por alvenanta kampanjo en la lernejoj, kie nepre ni devas iniciati la prelegojn, por poste starigi la kursojn. La kampanjon oni devas bone prepari, pripensi kaj prikalkuli. La efiko devas esti certa, kaj sukcesa.

MALLONGAJ SCIIGOJ

2-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, kiu estis okazonta en Bishop's Stortford (Britujo) pro teknikaj kaŭzoj estas prokrastita ĝis la jaro 1966. La lando kaj loko, same ankaŭ kiel la tempo, ne estas ankoraŭ deciditaj.

Ankoraŭ restas ĉe la eldonistoj sufiĉe multaj ekzempleroj de la tuta dokumentaro de la I-a Internacia Konferenco de Lernejoj en kiuj

Esperanto estas instruata. La 20 prelegoj kolektiĝas en 116-paĝa broŝuro. La broŝuro havas rektan pedagogian valoron, kaj ni rekomendas ĝin al ĉiu instruisto. Mendu kun antaŭpago de 10 ŝilingoj (aŭ 10 internaciaj respond-kuponoj) ĉe R. Markarian, 2 Hazel Grove, Chorley, Lancs, Britujo.

Novzelanda instruistino F-ino M. Wildey,

Queen's High School, Dunedin, Novzelando, skribas:

Mi petegas, ke ĉiuj E-instruistoj tra la mondo zorgu, ke iliaj lernantoj respondu al korespondpetoj de aliaj landoj, eĉ se nur por diri, ke ili ne povas plenumi la peton. El kvardek petoj faritaj lastatempe de miaj lernantoj en Novzelando, nur dek kvin ricevis respondojn.

lerneja bulteno n-ro 5

Raif Markarian

ALDONO AL LA LISTO DE REKOMENDITAJ LIBROJ POR LERNEJA UZO

(Vidu "Lerneja Bulteno" n-ro 2; "Esperanto" 1964, junio, p. 108-9.)

ATENTIGO al verkistoj kaj eldonistoj: Mi dankas pro la jam ricevitaĵoj sugestoj por aldonoj al nia listo. Tamen mi povas rekomendi nur tiujn librojn, kiujn mi jam vidis. Mi estas ĉiam preta tralegi libron kaj decidi, ĉu ĝi estas taŭga por lerneja uzo (temas precipe pri libroj taŭgaj ĝis la fino de duagrada studo, t.e. pri infana aŭ junulara literaturo). Mi bedaŭras, ke mi povas resendi librojn nur post ricevo de la resendkostoj. (R.M.)

KLASIGO de legolibroj laŭ utilo kaj facileco:

i: Taŭga por intensa legado kun instruisto.

l: Taŭga por libera legado sen instruisto.

b: Taŭga por la lerneja biblioteko.

d: Taŭga kiel donaco je la koncerna nivelo.

1. En la koncerna sekcio, A aŭ B, la plej facilaj libroj.

2. En sia sekcio, libroj pli malfacilaj.

3. En la koncerna sekcio la plej malfacilaj.

PREZOJ estas indikitaj en steloj.

A. ELEMENTAJ LERNEJOJ

Legolibroj

ilbd/1 (ne /3) "Eo por infanoj" (brita) 7,2

ilbd/2 "El Afriko" kaj 5 aliaj titoloj en serio de elementaj kaj distraĵoj legaĵoj sub la ĝenerala titolo "LEGU KAJ LERNU". Unuopaj titoloj kostas po 3 st., sed la tuta serio kun Lerneja Aldono kostas 21 st. afrankite. Petu informon pri lerneja rabato por kvantoj.

ilbd/3 "Bela konvolvulo" (ĉina). Kolora bildrakonto. 1,6

Gazetoj

"Planteto". Jarabono (4 n-roj) nun 14,4.

"Nia voĉeto" (SAT) 1/4-jara infangazeto. 8 st.

B. DUAGRADAJ LERNEJOJ

Lernolibroj

"Esperanto, la lingvo internacia facila por vi" (Walter) Aŭtodidakta metodo. 18,—

"Ni parolu E-on" (UTP) Instigas al frua parola uzo de la lingvo. 12,—

"Tra la mondo" (Editions Nova) 8 libretoj kun 6 diskoj 45 t.m. Ebligas al la lernanto aŭdi E-parolantojn el 12 landoj. Apartaj eldonoj por anglaj, francaj, germanaj, nederlandaj aŭ japanaj lernantoj. 234,—

Legolibroj

il/1 "Novaj E-Historietoj" (dana) 9,6

ilbd/2 "La vulpo" 1,6; "La fiero generalo" 3,2;

"Klopodo de simioj por elakvigi la lunon"

3,2. Ĉinaj bildorakontoj, koloraj.

bd/2 "Dek du piedetoj" (brita) Por katamantoj, prozo. 7,—

ilbd/3 "Distra koktelo". Prozo, enigmoj. 10,—

"Sovaĝaj plumoj" (brita). Kvakera rak. 5,—

"Zamenhofa legolibro" Prozo. 5,—

"La kvin fratoj" (ĉina). Kol. bildrak. 3,2

"Aŝma" (Ĉinujo) Ilustrita poemo. 10,6

"Sun Vukong" (ĉina) Bildrakonto. 6,4

"Suspektinda persono" (jugos.) Teatraĵo. 4,8

"Meteoro" (slovaka) Teatraĵo. 6,—

bd/3 "Enciklopedieto Japano". 72,—

Porinstruistaj libroj kaj dokumentoj

"La lingva problemo en internaciaj rilatoj"

(CED dok. A/II/1-2, angle aŭ Esp-e) 4,—

"La eduka valoro de E-instruado en la lernejoj"

(CED dok. B/I/2, angle aŭ Esp-e) 3,2

"Mitoj kaj faktoj pri Eo"

(CED dok. A/IV/7, angle aŭ Esp-e) 2,—

"Lingvo Stilo Formo" (Kalocsay) 15,2

"Plena Vortaro" Poŝformata 44,4; pli granda 60,—

"Gvidlibro por supera ekzameno" Vol. I. 4,—

Gazetoj

"Planteto" (vidu la elementan sekcion A)

"Legu kaj lernu" (vidu la elementan sekcion):

B/ilbd/2 "Idetoj". 3,—

B/lbd/2 "Vortludoj". 3,—

B/ilbd/2 "Kion vi faras?" Ekzercaro. 4,—

KONSULTA

KOMISIONO PRI LERNEJOJ

(KKL)

Generalaĵoj kaj rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx Britujo. Anstataŭanto: S-ro Józef Toczyński, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572

Organizaj demandoj: S-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

esperanto
junio 1965

Kalevala, popola epopeo. El la finna tradukis J. E. Leppäkoski. Eldonis Fondumo Esperanto en la serio Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA, Helsinko, 1964. Kun postprezento de Vilho Setälä. 368 p. 21 × 15 cm. Tolbind.: 25,— gld. (100 st.); kun leda dorso: 35,— gld. (140 st.)*

Oni povus diri en sia entuziasmo, ke la tradukinto donacis al Esperantujo tutan mondon.

Jes, Kalevala estas ne nur epopeo, sed tuta mondo, tiel same kiel tuta mondo estas la Homeraj epopeoj. Sed la mondo de Kalevala estas pli pratempa ol la Homera, eĉ pli pratempa ol la ŝumeraj-asiraj epopeoj parolantaj pri urboganta popolo: en Kalevala ne ekzistas urboj, ĉio okazas sur la kamparo, sur brulsarkejoj, en arbaroj, en kampodomoj. Tiu praeco, kompreneble estas ne tempa, sed socio-struktura: en Kalevala vivas ankoraŭ la genta socio, antaŭa al la sklavtena kaj feŭdalisma, iel simila al tiu de la indianoj de Kanado, eĉ — eble, de la eŭropanoj de la glacia epoko. En Karelio, en la malproksima Nordo — tie estis la ĉefa trovloko de la Kalevalaj runoj — eĉ en la 15-16-a jarcento povis ankoraŭ evolui, flori kaj disbranĉi tiu pratipa poezio, kiun pli sude kaj okcidente jam neniigis la feŭdalismo, ekstermis la kristanismo. Kiam Lönnrot, inter 1828 kaj 1849, kolektis la runojn de la epopeo, tiu socio-strukturo jam ĉesis, tiel ke la kantistoj jam ne memoris pri ĝi, memoris nur la kantoj, kaj ili pri la kantoj. Eĉ pri tiuj ne perfekte: preskaŭ ĉiu diris al Lönnrot, ke antaŭ longe oni sciis multe pli multajn kaj belajn kantojn.

Multo perdiĝis do, sed kia trezoro estas, kio restis, kia riĉega fonto de tradicioj por la finna nacia kulturo! Oni povus diri, ke iel simile, kiel Homero influis la kulturan vivon de la helenoj ("Homero edukis Helladon" — diris Platono), Kalevala fariĝis centro de la finna kultura kaj spirita vivo: literaturo, filologio, belaj artoj, muziko. Pri ĝia populareco estas karakterize, ke poste la folkloristoj trovis plurajn popolkantojn, kiujn la popolo ĉerpis jam ne el buŝtradicio, sed el la eldonita Kalevala.

La kadro de la epopeo estas la rekonkero de la mirakla muelilo Sampo, kiu muelas por ĉiuj bonhavan kaj feliĉon. La rekonkero ne sukcesas perfekte: nur rubojn, splitojn de Sampo oni povas savi, sed eĉ tiuj povas esti fonto de feliĉo eterna.

Multe pli grava, tamen, ol tiu epopea kadro, estas la epizodoj de la epopeo: la historio de la ventanima kaj labilmensa Lemminkäinen, batalema kaj flirtema, nerezistebla virinkonkeranto, al kiu


kien li la kapon turnis, tie oni donis kison,

kaj kies patrino estas kvazaŭ la enkorpiĝo de la patrino amo ĉiopova; la historio de Kullervo, kiu vivas obsedite nur por la venĝo pro sia ekstermita gento kaj fariĝas viktimo de nevola incesto kiel reĝo Edipo. Sed la centra figuro estas aĝa saĝa Väinämöinen, la eterna praktikanto, kiu estas ŝamano, sed per sia naskiĝo kaj siaj vortoj kaj faroj kreskas en mitajn dimensiojn, ĉar li scias la plej magiajn kantojn, kaj en tiu mondo la kanto havas miraklan efikon: la plej granda heroo estas, kiu plej bele kantas. Kaj tiu norda bardo ne malpli scias kanti ol la grekmita Orfeo: birdoj, fiŝoj, vermoj venas aŭskulti lian ensorĉan kanton, de kiu


floroj ekburĝonis bele kaj arbustoj riverencis.

Per kanto li endormigas la tutan popolon de la mastrino de l' Nordo; la fanfaronan junan Joukohainen li kantas ĝiskole en la teron. Li scias ĉiujn metiojn, ekstermas arbaron, kulturas teron, faras boaton, fiŝkaptas, ĉasas, kaj, se necese, kuracas, estas saĝa gvidanto de sia gento. Lian bonan koron montras, ke ĉe arbar-

KALEVALA: CENTRO



Kalevala, 33-a kanto: la damno de Kullervo. Pentraĵo de A. Gallen-Kallela. (La ilustraĵoj sur ĉi tiu kaj la sekva paĝo ne estas tiuj, kiuj aperas en la esperanta eldono).



Kalevala, 10-a kanto: Ilmarinen forĝas la miraklan muelilon Sampo. Pentraĵo de A. Gallen-Kallela.

recenzi

kiam ekregas la filo de Marjatta (Maria), la olda Väinämöinen foriras por eterne.

Vigle restas en la memoro la realistaj kaj lirikaj partoj de la epopeo, kantantaj la alte respektatan forĝistan laboron, la ŝpinadon kaj teksadon de knabinoj, la hejman laboradon, la ĉasadon, fiŝkaptadon, saŭno-banon, veladon, skiadon, la ĝojojn de la nuptofesteno kaj de la geedza vivo. Ankaŭ la humuro estas reprezentata per fanfaronado, mensogado, troigaj priskriboj.

Ĉio ĉi estas prezentata per la praa poezia formo de la paralelismo kaj riĉaj aliteracioj, kiuj kune efikas vere iel magie, enlulas la aŭskultanton en ian staton de fasciniĝo. Se oni transdonas sin al tiu efiko, oni perdas ĉirkaŭ si la modernan medion kaj pli kaj pli sentas sin ĉirkaŭata de mondo de fabelo, per kiu nin ĉirkaŭverŝas fantazio prapopola kun epopea abundo kaj en kiu ni baldaŭ fartas tre bone.

DE LA FINNA KULTURO

ekstremo li lasas betulon staranta, por ke la kukolo havu kien flugi por sidiĝi. Lia malforta flanko estas lia maljunula avido je junulinoj: la kompatinda Aino elektas prefere la morton ol al li edziniĝi. Ankoraŭ unufoje li svatas sin pri junulino, sed post la rifuzo li rezigne prudentiĝas kaj deklaras:

*maljunul' ne svatu junan, nek deziru belulinon,
nek rivale strebu svati konkurante kun pli junaj.*

Krom la kanto, la alia mirindaĵo en tiu mondo estas la fero, tiom ke eĉ Väinämöinen ne scias sanigi sian ferfaritan vundon, kaj Ilmarinen, la forĝisto, kiu povas manipuli tiun sorĉan metalon, fariĝas mita persono: forĝinto de la firmamento, li povas forĝi ankaŭ flugantan birdon el fero. Tamen, ankaŭ lia povo havas limojn: vane li provas forĝi el oro edzinon anstataŭ la edzino mortinta, la statuo restas senviva, ĉar, kiel avertas aĝa saĝa Väinämöinen:

*Oro spiras nur malvarmon kaj arĝento frapas
froste.*

Ankaŭ naiva kosmogonio troviĝas en la epopeo kaj mitologiaj estaĵoj: feoj kaj feinoj de akvo, de ondoj, de arbaro, aperas ankaŭ Ukko, la dio de la ĉielo: la mondo de Kalevala estas pagana mondo. Montriĝas ja ankaŭ kristana influo tie ĉi kaj tie, sed ties spuroj, kiujn Lönnrot eble alprenis por kapti la bonvolon de la klerikaro, estas fremdaj al la tuto de la epopeo, pravigante la lastan kanton:

Kristalklara traduko

La traduko estas riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo. Tuj komence, la enkonduko kaptas la leganton per vere sorĉa sonefiko de aliteracioj kaj pensoritmo:

*Menso mia estas ema, cerbo mia certe celas
kanti nun, komenci ruli tiujn riĉajn rasajn
runojn,
kiujn la prapatroj pensis, kreis nia nobla gento.
Vortoj en la buŝo bolas, versoj laŭ la lango
svarmas,
ritmoj interdente rajdas, melodioj moduliĝas.*

Eĉ se tiun sonmuzikon la traduko ne povas teni senintermite tra ĉiuj kvindek kantoj de la epopeo, sed ĉiam ree kaj ree li povas doni al la versoj la ŝamanan magion de la literimaj. Lia ritmo estas senriproĉa: neniam li pekas kontraŭ la severa trokeeco de la teksto kaj la pureco de la cezuro. Kaj lia lingvaĵo estas kristalklara, ĉie facilege komprenebla; fakte oni povas konsenti kun la postprezentanto V. Setälä, ke ĝi estas rekomendebla ankaŭ kiel lingva ekzerco de ne tre progresinta esperantisto.

La tradukinto, J. V. Leppäkoski, ne estas tre konata en Esperantujo, kvankam jam en 1923 li tradukis modele poemojn de Koskeniemi por Literatura Mondo. De tiam pasis pli ol kvardek jaroj, kaj la grandan parton de ĉi tiu tempo li dediĉis al ĉi tiu laboro, per kiu li donis al ni tradukon almenaŭ egalnivelan al iu ajn traduko nacilingva, kaj li mem leviĝis inter la klasikulojn de la Esperanta tradukarto.

K. Kalocsay

esperanta
junio 1965

Kiamaniere disvastigi Esperanton de Anton H. Tanner. Eld. la aŭtoro, Munkeno, 1964. 73 p. kun aldonajoj. 6,50 gld. (26 st.)*

Mi kun granda intereso tralegis pli ol 70 paperfoliojn, kiuj estas nebinditaj en kartona ujo. Temas pri varbgvidilo — pri la ĉiama problemo, kiamaniere oni disvastigu Esperanton. La aŭtoro deziras provi novan sistemon. La kluboj, la unuopaj esperantistoj povas elpreni unu aŭ plurajn foliojn, kiuj estu bazo por diskutoj fare de iu Loka Informa Fakto aŭ Kluba Estraro. S-ro Tanner bonvensalutas novajn proponojn. Nepre bona alvoko, ĉar instiga informfaka gvidilo devas — precize sed mallonge — prezenti opiniojn el diversaj regionoj de nia mondo kaj ne prefere raporti pri agadsistemo de la Loka Societo en Mun-

keno, kiu kompreneble estas ege bona kaj vere imitinda. Permesu ĉirilate, ke mi tamen esprimu dubon pri ekzemple la Nigra Listo de Komercistoj k.s. kaj pri kelkaj proponoj, kiuj verdire estas nur deziresprimoj. La tuta ideo estas tiel bona, ke mi sugestas, ke UEA kaj la Landaj Asocioj nun instigu la Lokajn Societojn diskuti la problemojn kaj sekvi la proponon de la aŭtoro sendi al li novajn ideojn kaj proprajn spertojn. Mi krome sugestas, ke li kune kun kelkaj amikoj, kiujn li mem povas elekti en diversaj landoj, ellaboru duan eldonon. La Landaj Asocioj ricevu po unu kopio por mem aŭ en kunlaboro kun la sperta s-ro Tanner pretigi ekzemplerojn por ĉiuj siaj Lokaj Societoj.

Jan Strönne (Malmö)

Meze de l' flamoj, diversaŭtoraj noveloj, tr. el la vjetnama. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1965. 213 p., 19 × 13 cm. 2,00 gld.*

La plej nova volumo el Hanojo enhavas 12 novelojn de naŭ aŭtoroj (4 de Fan Tu). La temoj rilatas senescepte al Sud-Vjetnamio dum la lastaj jaroj, kaj prezentas scenojn el la tiea milito: bataloj, torturoj, "strategiaj vilaĝoj", manifestacioj, kaŝado de revoluciuloj. Generale la literatura nivelo ne estas alta, sed Fan Tu montras talenton per drameca konstruo ("Rekonsciiĝo"), kaj en "La vilaĝo Ra Pong" de Nguyen Thieu Nam oni trovas iom da humuro kaj loka intereso (vivmaniero de nacimalplimulto).

V. S.

La ĉina revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1965. 61 p. 15 × 10 cm. 0,45 gld.*

La aktuala situacio kaj nia politiko post la venko en la kontraŭjapana rezistmilito, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1965. 28 p. 15 × 10 cm. 0,25 gld.*

Resumo: La plej novaj tradukoj el verkoj de Maŭ zedong aperas en novaj preso kaj formato. La unua, el 1939, prezentas la socian evoluon de Ĉinujo ekde antikvaj tempoj, ĝian historion de revoluciaj luktoj kaj ĝian klasan strukturon el taktika vidpunkto. La dua, el 1945, difinis la estontan politikon de KPC kontraŭ Kuomintango.

Raciaj derivoj kaj verbuzo, de Emilo Gasse. Eld. la aŭtoro, Francujo, 1964. 8 p. 21 × 14 cm. 0,55 gld. (2,2 st).*

Pri la strukturo de Esperanto tiu libro estas gvidilo tre malfidinda. La kriterio por la gramatika karaktero de la radikoj estas trovita jam delonge: la vortspeco de iliaj tradukoj en la Fundamento. Anstataŭigante tiun kriterion per tute arbitraj la verkinto atribuas al ne malpli ol 136 radikoj gramatikan karakteron kontraŭfundamentan.

W. A. Verloren van Themaat (Amsterdam)

El la vivo de Ludoviko Zamenhof, legolibreto de Gösta Henriksson. Eldona Soc. Esperanto, Malmö 1964. 16 p. 18 × 13 cm. 2,— gld. (8 st).*

Bele eldonita, tiu ĉi libreto pri la junaĝaj jaroj de la knabo Ludoviko devas kapti la imagon de nova esperantisto. Ĝi klarigas en facile legeblaj vortoj la esperojn kaj malĝojojn de la junulo. La libreto estas klare presita kaj mi rekomendas ĝin kiel donaceton al nova lernanto.

Robert H. Fletcher (Nottingham)

Pri la pseŭdokomunismo de Ĥruŝĉov kaj ĝia historia leciono por la mondo. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 72 p. 18 × 13 cm. 0,65 gld.*

Resumo: Tiu ĉi "Naŭa komento pri la malferma letero de la Centra Komitato de KPSU" pritraktas la koncepton de "tutpopola ŝtato", elmetitan en la 22-a Kongreso de KPSU, kaj konkludas, ke ĝi estas neeblaĵo.

Petr Bezruč (1867-1958). Eld. Památník Petra Bezruče (Memordomo de P.B.), Opava, Ĉeĥoslovakio, 1965. 6000 ekz. 16 p. 15 × 21 cm., il. Senpaga broŝuro kun biografio, bibliografio kaj tradukoj de 5 verkoj de la poeto.

Grafike elstara libreto nepre posedinda. La tradukoj estas de R. Hromada kaj J. Kořínek.

LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ: KOREKTO

En mia recenzo en la numero de aprilo 1965 mi skribis: "Kelkaj eraroj, ekz. la uzado de demonstrativo anstataŭ la artikolo, estas preskaŭ sistemaj." Poste mi ricevis leteron de la tradukinto, en kiu li skribis, ke li antaŭ la publikigo kontroligis sian tradukon de la (nun mortinta) akademiano Porto Carreiro Neto. Mi kritikante lian uzadon bazu min sur la Plena Gramatiko. Temas do ne pri simplaj eraroj, sed pri malkonsento inter la kompetentuloj.

Fajro ! Fajro ! k.a. teatraĵetoj, de R. Mackay. Eld. SBET, Britujo, 1965. 23 p. 17 × 11 cm., mult., il. Por elementaj lernejoj. 0,75 gld.*

Guste mencias s-ro Markarian en la antaŭparolo, ke grava afero estas en nia literaturo la manko de taŭgaj teatraĵetoj por junaj komencantoj. Naŭ teatraĵetoj troviĝas en la libreto, kiujn oni bonege povas uzi ne nur por legado, sed ankaŭ en la kadro de amuzaj vesperoj. Apartan atenton meritas la altvaloraj vortoj de d-ro Mario Pei, Usono, cititaj post la antaŭparolo de la libro pri la uzo de Esperanto en la elementaj lernejoj. Mi kredas, ke la aŭtoro sekve de anglalingva influo skribis "vivĉambro" (living-room), "sid-ĉambro" (sitting-room), "litĉambro" (bedroom).

El Afriko kaj Vortludoj. Serio "Legu kaj lernu" n-roj 1 kaj 3. Eld. Faux, Britujo, 1964-5.

Po 24 p., 17 × 11 cm., il., mult. Po 0,75 gld (3 st.)*

"El Afriko" enhavas rakontojn pri 12 bestoj kaj birdoj vivantaj en Afriko. Sprita bantua rakonto, desegno de afrika vilaĝo, sudafrika kaj ĉada kantoj, artikolo pri la Nilo kaj pri la standardo de Gano ne nur amuzas la leganton, sed ankaŭ plilarĝigas lian konon pri la afrika kontinento. Facila stilo, instruamuzaj desegnaĵoj altiras nian atenton.

"Vortludoj" estas la tria kajero de la serio. En la revolucia evoluo de la lingvoinstruado depost longa tempo estas pritraktita la problemo, kiel oni devas instrui vortojn. Jen, la libreto donas multajn ekzemplojn per kiuj la instruisto distre povas helpi la enmemorigon. La vortludoj taŭgas por lernejoj kaj klubaj grupoj. Andreo Gauder (Hungarujo)

* Ricevebla ĉe UEA

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Eszperantó társalgási zsebkönyv (konversacia poŝlibro) de Mátéffy józsef kaj Nagy istván. Eld. Tankönyvkiadó, Budapest, 1964. 111 p. 16 × 12 cm.

Evangelia kantaro eklezia en Esperanto, tr. Richard Hoppe, 8802 Auerbach Mittelfr., Germanujo, 1965. 56 p. 14 × 10 cm., mult.

Letero de kvakero, de Alfred G. Tucker. Eld. Kvakera E-ista Soc., Britujo, 1965. 15 p. 18 × 11 cm. 0,25 gld. (1 st.)*

Berlin. Eld. Verkehrsamt Berlin, Fasanenstr. 7-8, 1 Berlin 12, Germanujo. Nova belkolora turisma prospekto kun plano de la urbo, senpage ricevebla de la menciita adreso.

Manuale pratico della lingua Esperanto (Praktika lernolibro). Kvara eld. Itala E-ista Katolika Unuiĝo, Milano, 1965. 111 p. 17 × 12 cm.*

Korelo, de L. G. Hartridge. Eld. la aŭtoro, 64 Laurier Road, Addiscombe, Croydon, Britujo. Korelativ-instrua ludo por anglalingvanoj. Prezo: 1 ŝil. (2 st.) plus afranko 1 st.

Esperanto za železničare (por fervojistoj), de Gvozden Sredić. Eld. Jugoslavia As. de Fervojistoj E-istoj, Beograd 1965. 229 p. 17 × 12 cm., il.*

Vivo ege valora kaj brava, de H. J. Grimm. Eld. la aŭtoro, 232 Plön, Apenr. Str. 25, Germanujo. 17 p. 15 × 11 cm., multobl. Rakonto.

Primošten. Eld. Turisma Societo Primošten, Jugoslavio, 1965. Senpaga turisma prospekto.

Foiro de Barcelono. Eld. Feria Oficial e Internacional de Muestras, Paseo de María Cristina (Parque Montjuich), Barcelona, Hispanujo. Senpagaj komercaj afiŝoj.

Muzeo de Slovaka Nacia Revolucio, Banská Bystrica, Ĉeĥoslovakio. 1965. Senpaga prospekto.

Tri majstroj, de Gösta Henriksson. Biografioj de Antonius Stradivarius, Nicolo Paganini kaj Bedrich Smetana. Eld. la aŭtoro, Malmö 1965. 19 p. 22 × 17 cm., mult. 2,— gld. (8 st.)*

CHARLES THOLLET

nekrologoj

La 14-an de aprilo subite forpasis s-ro Charles Thollet, Kenitra, Maroko, konata, sindediĉa kaj larĝanima membro de la Asocio. Dum multaj jaroj s-ro Thollet estis komitatano A por Maroka Esperanto-Asocio. Lastatempe li estis komitatano C.

S-ro Thollet estis inter la unuaj dek personoj, kiuj, okaze de la fondiĝo de CED, per mondonaco ebligis ĝian ekfunkcion. La unuan eldonon de la konata seslingva faldfolio li malavare subvenciis. Li ebligis la aperon de la afrika broŝuro de T. Sekelj en la araba lingvo. Antaŭ nelonge li sukcesis okazigi kaj mem prizorgis radio-kurson.

UEA ĉiam memoros tiun rimarkindan membron kun granda respekto.

DELFI DALMAU (1891-1965)

Prof Delfi Dalmau, akademiano, multjara delegito de UEA en Barcelona kaj peranto en Hispanujo, mortis la 15-an de aprilo. Li estis jam de antaŭ la unua monda milito la plej elstara figuro de la kataluna E-movado. Li redaktis la iaman "Kataluna Esperantisto"; faris paroladojn kaj kursojn; verkis artikolojn, librojn, diskojn pri korekta elparolo, ktp.


Kiel filologo li fariĝis unu el la plej spertaj eminentuloj de la renaskiĝinta kataluna lingvo, en kiu li verkis romanojn kaj aliajn librojn.

DANIELO BURGIER

S-ro Daniele Burgier mortis la 15-an de februaro, 61-jara, en Amsterdam. Li estis redaktoro de "La Internacia Fervojisto", organo de IFEF.

ISTVÁN KOSSA (1904-1965)

La 9-an de aprilo mortis en Budapest s-ro István Kossa, ĝis antaŭ nelonge la hungara Ministro de Trafiko kaj Poŝto, ekde 1945 prezidanto de la Hungarlanda E-ista Laborista Societo. En 1962 li festparolis esperante en la 14-a IFEF-kongreso en Budapest.



esperanto
junio 1965

mallongaj novaĵoj

LAŬLANDE

Azio

● F-ino Elsie Parson el Britujo, unu el la pioniroj de APO (Agado en Proksima Oriento), alvenis en Japanujo post plurmonata vojaĝo tra Azio, dum kiu ŝi kontaktis kun esperantistoj precipe en Hindujo kaj Cejlono.

Ĉeĥoslovakio

● En februaro la ministerio por instruado kaj kulturo starigis novan Ĉeĥoslovakian E-Komitaton kiel sian konsilan organizaĵon, sub prezidanteco de s-ro František Sviták. Kun la periodaĵo Informoj de ĈSEK aperas de nun ankaŭ kultura aldono.

Francujo

● La franca asocio de amikoj de Unesko (Ligue Française "Pro UNESCO", 11 place des Vosges, Paris 4e) eldonas 4-lingvan (F, A, G, It) faldfolion pri Esperanto. Prezo: 19 fr.fr. por mil ekz. plus 2,90 fr. por afranko. (Poŝta ĉekkonto No. 16.233.37 Paris). Petu specimenon kun cirkulero.

● La Informa Fakto de UFE estas de nun dividita inter s-ro G. Rougetet (eksteraj rilatoj), per la adreso en la Jarlibro 1965/I, p. 37, kaj s-ro A. Bourdeaux (gazetaro, radio kaj TV), 164 rue de Saussure, Paris 17.

Germanujo

● Oficiala E-organizaĵo estas fondita en Orienta Germanujo en la kadro de la ŝtata Kulturligo. Jam funkcias Centra Komisiono en Berlino. En la gazeto "Der Morgen" komencis aperi kurso verkita de s-ro Paul Lindner.

Hispanujo

● Invitite de la Universitato de La Laguna, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, prof. G. Waringhien, prelegis tie franclingve pri la nuntempa franca romano kaj en Esperanto pri "Unu soneto de Kálmán Kalocsay". La vizito vekis favoran atenton de la radio, televido kaj gazetaro.

LAŬFAKE

Fotografio

● ILEF (Int. Ligo de E-istoj Foto- Kino- kaj Magnetofon-amatoroj) anoncas s-ron L. Vallés, Hispanujo, kaj s-ron Géo Junier, Francujo, kiel gajnintojn de la foto- kaj magnetofonokonkursoj de ILEF, respektive (vidu "Esperanto" 1964, sept., p. 159). Novaj konkursoj, pri la temo "Esperantujo 1965", estas anoncitaj laŭ la sama regularo. Nur, la daŭro de magnetofonaj konkursaĵoj estu maksimume 20 minutoj. Limdato: 1 dec. 1965. Adreso: ILEF, Box 36, Skövde 1, Svedujo.

Kino

● La filmon "Angoroj" prezentas en junio 1965, en la originala lingvo (Esperanto), la "Palais de la découverte" (Francujo). Daŭrigo post la unuaj kvar prezentoj dependos de ties rezultoj. Ankaŭ televido kaj komerca filmkompanio interesiĝas.

Literaturo

● Laŭ bulgarlingva bibliografia verko "Bulgara artiliteraturo en fremdaj lingvoj 1823-1962", Esperanto okupas per la nombro de tradukoj el la bulgara la trian lokon, egale kun la franca, post la rusa (23,5%) kaj la angla (ĉ. 10%). Sekvas laŭvice 62 aliaj lingvoj.

ESPERANTA KONKURSO PRI MALTO

La "Malta Esp.-Societo" anoncas tutmondan konkurson okaze de la 4-a jarcento de la Granda Sieĝo Malta (1565-1965).

Temoj: a) La Sieĝo de Malto (1565).

b) Malto meze de la Mediteraneo.

Oni rajtas pritrakti esperantlingve unu aŭ du temojn (ĉiu artikolo po 1000-2000 vortoj).

La konkursa kotizo estas 4 steloj aŭ egalvaloro (partopreno senpaga por nepagipovaj landoj) sendepende de la nombro de temoj.

Oni sendu konkursaĵojn laŭeble maŝinskribitajn en tri ekzempleroj, kun pseŭdonimo. La nomo, adreso kaj pseŭdonimo estu fermitaj en aparta koverto. Ĉion oni sendu al la Sekretario — Esperanto-Konkurso, "Melcar", New Str. in Cannon Rd., ST. VENERA, MALTA.

Limdato: la lasta tago de septembro.

Estas tri premioj: memoraĵoj afable donacitaj de la ŝtata Turistkomitato: tri Maltaj boatoj el arĝento, diversgrandaj laŭ kategorio gajnita, kaj tri diplomoj.

La Turistoficejo sendus turistliteraturon pri Malto al ĉiu partoprenonto, se li anoncus sin tuj al la Sekretario jam menciita.

DISVASTIGO PETATA.



Unuiĝintaj Nacioj: Post dupaĝa artikolo en la organo de la Sekretariato de UN "Secretariat News", komenciĝis speciala kurso por oficistoj de la Sekretariato sub gvido de s-ro Mark Starr, instruisto tre konata en Usono kaj alilande. (Foto)

50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio, 31.VII - 7.VIII. 1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio.

OFICIALA KOMUNIKO

N. 9 La 4-an de majo 1965

Loĝiga Servo.

La loĝiga Servo de la Universala Kongreso atentigas, ke post la 30-a de junio ne plu estos eble rezervi litojn. Sekve, la mendiloj, kiuj atingos la konstantan adreson de la Kongreso post la 20-a de junio, estos resenditaj kaj la pagita maklerajo repagita, minus 1,— gld (4 steloj) pro elspezoj.

La nombro da litoj je dispono en la Kat. F (Komuna Loĝejo) estas jam elĉerpita. La 1-litaj ĉambroj ankaŭ ne plu estas liberaj. La kongresanoj, kiuj ankoraŭ ne mendis loĝejon, nepre indiku en kiu(j) kategorio(j) ili deziras loĝi, en kazo ke la kategorio mendita estas jam elĉerpita.

Foto-konkurso.

La personoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la fotojn por la konkurso (vidu Of. Kom. no. 7), bonvolu tion fari per aerpoŝto (presaĵe) kaj ilin sendi

al: 50-a Universala Kongreso de Esperanto,
Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio, Japanujo.

Karavanoj.

Ĉiuj organizantoj de karavanoj bonvolu aerpoŝte informi la Lokan Kongresan Komitaton pri la precizaj tago kaj horo de alveno al Tokio kaj ankaŭ pri la nombro de la partoprenantoj. Nur laŭ tio estos ebleco aranĝi taŭgan akcepton ĉe la flughaveno.

Infana Kongreseto.

Pro la nesufiĉa nombro de aliĝoj, LKK estas devigita rezigni je la okazigo de la 10-a Internacia Infana Kongreseto.

Statistiko (ĝis 4.5.65).

Alĝ. 1, Arg. 4, Aŭstralio 31, Aŭstrio 8, Bahamaj Ins. 2, Belg. 9, Braz. 9, Brit. 43, Bulg. 12, C.A.R. 1, Ĉeĥos. 1, Dan. 20, Finn. 7, Fran. 93, Ganao 1, Germ. 46, Hind. 1, Hisp. 7, Honkongo 2, Hung. 8, Irl. 1, Isr. 2, It. 41, Jap. 821, Jug. 10, Kameruno 2, Kan. 6, Kor. 3, Mar. 2, Meks. 2, Mon. 2, Ned. 32, Norv. 11, Nov-Z. 16, Pol. 36, Port. 1, Rum. 1, Sov. 1, Sved. 54, Svis. 12, Urug. 4, U.A.R. 1, Usono 60, Venez. 3. Entute 1430 el 44 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario



AŬTOBUSA KARAVANO AL TOKIO

ekveturos el Beograd, Jugoslavio, la 4-an de julio, kaj trapasos Bulgarujon, Grekujon, Turkujon, Libanon, Sirion, Irakon, Iranon, Afganujon, Pakistanon kaj Hindujon. La 25-an de julio la karavano alvenos al Kalikato, de kie ĝi pluvojaĝos aviadile, haltante survoje en Birmo, Tajlando, Kamboĝo kaj Hongkongo. Alveno en Tokio: 30 julio; foriro el Tokio:

14 aŭgusto. Revenvojaĝo per malsama sed simila vojo. Kosto: £ 450 (4500 gld.) aŭ egalvaloro. Organizas kaj pli detale informas: S-ro Tibor Sekelj, Pop Lukina 1, Beograd, Jugoslavio.

Se vi ne povas mem vojaĝi al Tokio,

ALIĜU SIMBOLE AL LA 50-A !

Vidu paĝon 79 de la aprila eldono.

KVAR HAJKOJ

de nekonataj aŭtoroj

*Mi vin skribontis,
paperen roz' disfalis;
pli, ĉu direble ?*

*De l' vilaĝeto
du koroj en la ŝutroj
eklumas kune.*

*En puta fundo
videblas la ĉielo
de l' antipodo.*

*Malantaŭ muro
jen kio ? — Vent' respondas :
jasmeno certe !*

Esperanten adaptis :

PAUL LOBUT

En la plej nova eldono de

MONDA KULTURO

vi povas legi:

"La hispana kontraŭ la prakanariaj lingvoj",
ISU-prelego de prof. J. Régulo-Pérez.

"Sociologiaj aspektoj de la nuntempa hispano-amerika romano", de Paul Verdevoye.

"Ĉirkaŭ la centjaro de Miguel de Unamuno",
pri grava hispana verkisto.

"Pseŭdonomoj de Zamenhof" de N.Z. Maimon.

"La vivodramo de Deniza Legrix", raporto de
Paul Lobut pri kripla pentristino.

"Frina", klasiktema poemo de Penĉo Slavejkov,
tradukita el la bulgara.

"Richard Strauss: komponisto kaj teatro-
verkisto", studo de Karl Ruhrberg.

"La neĝo sur turoj de Praha", moderna ĉeĥa
poezio de Jan Noha.

"Homo alfrontas la morton", el romano de
angla verkistino Iris Murdoch (1963).

Krome: citaĵoj, recenzoj, el la kultura mondo
(aktualaĵoj), fotoj, dialogo kun la legantoj.

esperanto
junio 1965



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando.

INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO

de Fondajo Anne Frank,
anoncita por 25-31 aŭgusto 1965, nun
bedaŭrinde ne povos okazi en Espe-
ranto. Okazos de 19-25 julio angla-
lingva konferenco pri la sama temo.

"Jen Kimrujo ! La geknaboj de Kimrujo vokas la geknabojn de la mondo je la Tago de Bonvolo !

Ni ĝojas ke ni naskiĝis en tiel ekscita epoko – epoko de maŝinoj, de rapideco kaj de vojaĝado. Multaj el ni jam kutimiĝis al vojaĝado kaj la vivo fariĝis pro tio des pli riĉa.

Ni bedaŭras tamen, ke ankoraŭ ekzistas barieroj kiuj estas malfacile venkeblaj – barieroj inter unu lando kaj alia, inter nacio kaj nacio, kaj precipe inter negro kaj blankulo. Kiaj ajn la kialoj de ĉi tiuj barieroj, niaj vivoj fariĝas pli malriĉaj pro ilia nura ekzisto. Ni do, la junularo de la mondo, kuniĝu en sincera penado por taksu la kontribuojn de ĉiuj nacioj kaj kompreni iliajn esperojn kaj iliajn malfacilaĵojn. Farante tion, ni povas helpi la forigon de la duboj kiuj limigas nian liberecon kaj la timoj kiuj malhelpas al komprenado. Tiel ankaŭ, ni povas sperti la vibron de amikeco kaj la potencon de bonvolo !"

Ĉi tio estas la teksto de la t.n. Bonvol-mesaĝo, ĉiujare je la 18-a de majo dissendata de la Kimra Junulara Ligo, potenca junulara organizo. La tradicio jam datas de 1922, kaj ĉiujare la mesaĝo vekas pli da eĥoj en la tuta mondo. Ĝi aperas en presita kajero, kiu enhavas inter aliaj tradukoj ankaŭ oficialan Esperantan tradukon: la supran. Montru vian interesiĝon, kaj petu la libreton (en Esp.) al: Sekretario, Bonvolmesaĝo, Swyddfa'r Urdd, **Aberystwyth**, Kimrujo (Wales), Britujo. Disvastigu ĝian enhavon, parolu pri ĝi en via rondo, kaj sendu oficialajn salutojn al Urdd, subskribitajn de la ĉeestantoj kaj estraranoj. Apartajn sugestojn volonte sendos al vi la red. LJV.

**21A KONGRESO DE
TEJO**
OOTU - KIOTO
8-15A, AŬGUSTO, 1965

La preparo de la 21-a IJK prosperas. En la diversaj bultenoj (volonte sendataj laŭ peto) vi trovos abundajn informojn pri la alloga programo.

Tre gravas, ke multaj partoprenu la kongreson, por montri al la japana publiko la funkciadon de Esperanto, por montri al la junaj japanoj ke ili plene apartenas al nia organizo, kaj por sukcesigi la aranĝon. La nombro de aliĝoj (120) estas tute kontentiga, sed tro malmultaj (20) estas la ne-japanaj inter tiuj. Tial jena sincera invito: decidu antaŭ ĉio mem aliĝi al la 21-a IJK kaj samtempe instigu ĉe vi kiel eble plej multajn gejunulojn aliĝi al la Kongreso en la "Lando de la Leviĝanta Suno".

La kongreso meritas vian partoprenon !

Grava alvoko el Madagaskaro:

FI.ES.T.A.MA aŭ JEOM ŝerĉas gastigemulojn

Ni konstatas, ke de kelkaj monatoj la nombro ne nur de junaj esperantistoj malpliigas en Malagasio (Madagaskaro), sed ankaŭ la plenkreskuloj malaperas. La Organizaĵoj do ne plu povas sin vivteni, la financo ne permesas al ili fari iun ajn aktivecon. Ni uzis ĉiujn sistemojn por altiri la gejunulojn al la kursoj de Esperanto, sed ili preferas aŭskulti la radion.

Por veki ilin apud la radio-aparato, ni trovas novan kaj gravan sistemon, t.e. organizo de granda konkurso, kies premioj estas restado en eksterlandaj esperantistaj familioj dum minimume 60 tagoj.

Ni do alvokas ĉiujn gastigemulojn, kiuj povos senpage gastigi malagasajn esperantistojn, en jenaj landoj: Germanujo, Norvegujo, Danujo, Nederlando, Svedujo, Anglujo, Italujo, Belgujo, Hispanujo. – Helpu nin... !.. !

Kontaktadreso: – Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro (FI.ES.T.A.MA) B.P. 1678, Tananarivo. **Malagasa Respubliko.**

VIA HEJMO EN BRUSELO

"La Naturamiko" malfermos ekde la somerferio 1965 "Naturamikan Domon" en la koro de la urbo. Ĝi akceptos la geanojn de la "Naturamiko", de similaj turistaj asocioj, de la junularmovadoj kaj ĝenerale ĉiuaĝajn modestajn turistojn. Ili trovos en ĝi je tre moderaj prezoj komfortajn tranoktadon kaj manĝeblecon. Ĝi estos oportuna restadejo por vizito de la ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Plie, ĉar ĝi iĝos la kunvenejo de la N.-A. esperantista grupo, ni zorgos ke esperantista kontakto povu ĉiam okazi. Bonvenon al ĉiuj ! Adreso: Maison des "Amis de la Nature" – section Bruxelles 37, rue d'Argonne – Bruxelles 6 – Belgujo.

MALLONGE

S-ro E. Bonvoisin, el Calais (Francujo) partoprenis intervjuon en kadro de la junularaj programoj de Radio Luxembourg. S-ro B. trafe respondis al precizaj demandoj pri junularo kaj la Internacia Lingvo. Kelkaj temoj el la intervjuo: Ĉu Esperanto estas tuj interesa por junulo ? Amika korespondado per leteroj kaj sonbendoj. Kiom da tempo necesas por lerni la lingvon ? Miss Esperanto. Esperanto, hejma lingvo ktp. UFE-Parizo ricevis informetojn post la elsendo. Gratulon al s-ro B. kaj al la nova rondo en Calais !

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Jam anticipe plani* programon por la Tago de Unuiĝintaj Nacioj (laŭeble je 24 oktobro), kun aparta emfazo de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Inviti kompetentan preleganton, peti materialojn de la regiona UN-informejo, ktp.

2. *Diskuti la informan agadon* surbaze de la gvidilo "Kiamaniere disvastigi Eon" de A. H. Tanner (vidu recenzon p. 112).

3. *Aranĝi surbendigon* de radio-programoj en Esperanto kaj reaŭdigi dum kluba kunveno. Pendigi la ĝisdatan hortabelon (vidu "Esperanto" aprilo p. 77) sur la klubeja anonctabulo kaj instigi la anojn aŭskulti kaj skribi al radiostacioj.

4. *Komune traduki* en Esperanton mallon-

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

Radio Roma. La programoj publikigitaj en la aprila kaj maja numeroj ne plu validas. De la komenco de majo la dissendoj okazas nur ĉiun dimanĉon de 16.35 ĝis 16.50 (G.M.T.) per ondoj 31.33 m. (9570 kcs) kaj 25.20 m. (11900 kcs). La 2000-a dissendo de Radio Roma okazis la 9-an de majo. Jen la programo por junio: 6-VI, Tra la literaturo; 13-VI, Novaĵoj el Italujo; 20-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 27-VI, La fontanoj de Siena. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

gan artikolon pri kultura temo aktuale diskutata en la lando kaj proponi ĝin, prefere kun ilustraĵoj, al la red. de Monda Kulturo (D-ro A. Albault, 32 Ave. Et. Billières, Toulouse, Francujo.)



NOVA ALIĜINTA LANDA ASOCIO

Per ĵusa voĉdono la Komitato de UEA akceptis la organizaĵon Korea Esperanto-Societo kiel aliĝintan asocion laŭ la senco de art. 13 de la Statuto de UEA. Korea Esperanto-Societo (104-43 An Am-dong, Seoul, Suda Koreujo; tel. 5 1973) estis fondita en 1963 kaj havas 71 membrojn. Prezidanto: prof. Eunsang Lee; Vic-prez.: s-ro Suckhan Kim; Sek.: s-ro Taekeng Kim.

NOVA KOMITATANO DE UEA

Per ĵusa voĉdono la Komitato de UEA elektis sacerdoton A. Beckers, prezidanton de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, komitatano C de UEA, laŭ art. 25(C) de la Statuto de UEA.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz FD (Geofiziko): S-ro H. J. Schober, studento, Graz 4, Am Damm 11.

FD (Studentaj aferoj): la FD (Geofiziko).

Belgujo

Antwerpen FD (Zoologio): vakas.

Brazilo

Belo Horizonte FD (Religio: Evangelia Kristanismo): S-ro D. Prates Ribeiro, Rua Bernardo Cisneiros 12, Bairro Parque Riachuelo; tel. 4-8563.

Britujo

Crosby (Lancs) 60.000.

D: S-ro D. H. Withey, doganisto, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22; tel. WATERloo 2936.

FD (Skoltismo): la D.

Watford (Herts) 75.000.

D: F-ino V. Simpson, subestrino de presejo, 424 St. Albans Road; tel. Watford 27353.

FD (Presado): la D.

Danlando

København FD (Fotografio): vakas.

Finnlando

Helsinki D: la antaŭa VD (Lauttasaari).

LA ESPERANTA FLAGO

Laŭ propono de komitatano C. Støp-Bowitz, la Estraro de UEA decidis rekomendi, ke ĉiuj Esperanto-flagoj konformiĝu al la jenaj porcioj:

Longeco: Largeco: Latero de la blanka kvadrato = 3 : 2 : 1.

Latero de la blanka kvadrato: Radio de la cirklo ĉirkaŭskribebla ĉirkaŭ la stelo = 10 : 3,5.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro libertempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo. Dankon !

VD (Lauttasaari): vakas.

FD (Aŭtomata inform-traktado): la D.

FD (Hollerith-maŝinoj): vakas.

Jokela (Uudenmaan lääni) 4.000.

D: S-ro M. Saveljew, kartotekisto, Osuus-kassa.

JD: la D.

FD (Religio: ortodoksa): la D.

Francujo

Epernay FD (Fervojoj): vakas.

Toulouse FD (Turismo): S-ro T. Cristofol, poŝt-kontrolisto, 24 rue du Coin de la Moure.

Germanujo

6653 Blieskastel (Saar) 6.500.

D: S-ro G. Becker, mezlerneja ĉefinstruisto, Schlossbergstr. 51; tel. 706.

6736 Hambach/Weinstr. (Pfalz) 5.000.

D: S-ro M. Ritthaler, poŝtoficejo, Eingasse 63.

Hannover FD (Inĝenieraj aferoj): vakas.

Sulzbach VD: la JD.

FD (Literaturo: Esp, germ.): la JD.

Taifingen D: F-ino C. Conzelmann, oficistino, Königsbergerstr. 42.

Hispanujo

Aldaya (Valencia) 10.000.

D: S-ro M. Saballs Radresa, lignokomercisto, Remedio 28.

oficiala informilo
n-ro 380, 1. majo 1965

esperanto
junio 1965

Barcelona FD (Stenografio): vakas.
Palma de Mallorca FD (Mondfederalismo): S-ro Rafael Márquez, profesoro, Vía Roma 5 - 3º - izquierda; tel. 23411.
Santa Cruz de la Palma (Islas Canarias) 15.000.
 D: S-ro M. Sosvilla Massieu, oficisto, Alvarez de Abreu 29, apartado 22; tel. 8-1.

Italujo

Bari FD (Komerco): S-ro K. H. Renschler, komercisto, Via Ravanas 318; tel. 21 47 96.
 FD (Turismo): la FD (Komerco).
Biella FD (Komerco de teksmaterialoj): S-ro G. Lora Marzè, komercisto kaj tradukisto, Viale Cesare Battisti 2; tel. 25.042 - 23.322.
Catania VD: S-ro P. Zappalà, oficisto, Via Vincenzo Giuffrida 28 p. 3; tel. 248964.
Favaro Veneto D: vakas.
Ferrara 149.000.
 D: F-ino L. Miccoli, elementa instruistino, strato Cassoli 55; 38425.
Udine FD (Esperanto-instruado): S-ro G. della Savia, em. oficisto, Via Luigi Moretti 11/I; tel. 64619.
Verona FD (Medicino: kardiologio): S-ro G. Marchiori, Via Oberdan 18; tel. 25315.

Jugoslavio

Kranj (Slovenija) 22.000.
 VD: S-ro V. Ažman, raportisto, Prešernova 15
 FD (Turismo): la VD.
Novo Mesto (Slovenija) 8000.
 D: S-ro B. Vrbinc, agronomo-inĝeniero, Gotna Vas 28.

Meksiko

Orizaba (Ver.) 75.000.
 D: S-ro A. Gallardo Méndez, em. instruisto, Av. Poniente 2 No. 166; tel. 12-04.

Nederlando

Leeuwarden FD (Turismo): la VD.
Volendam 13.000.
 FD (Turismo): S-ro H. Hartog, poŝtoficisto, Dr. Weversstr. 33; tel. (02993) 32 29.

Norvegujo

Oslo VD: S-ino Kirsten Ek, dommastrino, Otto Ruges vei 66, Oslo 7; tel. 240564.

Pollando

Białystok FD (Esperanto-instruado): S-ino M. Grochowska, instruistino, ul. Żabia 16 m. 6.
Cieszyn FD (Arbarkulturo): la D.
Sosnowiec FD (Medicino): S-ro A. Górniak, kuracisto, str. Bema 1.
Starachowice (voj. Kielce) 38.000.
 D: S-ino D. Kubiak, instruistino, str. Mickiewicza 47; tel. 60 13.

Sovetunio

Barnaul (Rossijskaja SFSR) 400.000.
 D: S-ro A. E. Gončarov, inĝ. pri viando-produktado, Barnaul, 23, ul. 8-aja Zapadnaja 34, kv. 63; poŝtadreso Barnaul-99, P.K. 11.
Viljandi FD (Literaturo): S-ino H. Laane, fle-gistino, str. Tartu 42-2; tel. 304.

Svedujo

Hälsingborg FD (Trafiko): S-ro G. L. Persson, pedelo lerneja, Berzeliusplats 1; tel. 042/26799.
Kumla FD (Turismo): S-ro M. Adelind, tajloro, Mossbanegatan 3; tel. 019/71146.

Malmö FD (SOS-aŭto-servo): la FD (Fervojoj).
Stockholm FD (Filatelo): vakas.
 FD (Mondpolitiko): S-ro W. Bartel, arĥivano, Roslagsgatan 21 (ink. p.); tel. 107191 (lab.).
Storvik (Gästrikland) 2000.

D: S-ro G. Cronqvist, laktejestro, Kyrkvärdsgatan 12 b; tel. 0290-11035.
 FD (Industrio: lakto): la D.
Strängnäs 8000.
 D: S-ro M. Sjögren, flegisto, Krokvägen 2; tel. 0152/10925.

Trelleborg FD (Turismo): la FD (Skoltismo).
Uppsala D: la FD (Kontormaŝinoj).
Visby FD (Turismo): la FD (poŝto).

Svislando

Boudry FD (SOS-aŭto-servo): la D.
 FD (Turismo): la D.
 3034 **Murzelen** (Bern) 200.
 D: S-ro E. Muster, instruisto; tel. (031) 677576.
Zürich FD (Filozofio Krishnamurti): la FD (Religio Martinus).
 FD (Grafikarto): S-ro I. Mórocz, grafikisto, mezlerneja profesoro, Seebahnstr. 139, 8003 Zürich.
 FD (Reklamo): la FD (Grafikarto).

Usono

San Diego VD: S-ro Paul Stein, makleristo, 2850 Adrian St., Apt. 208; poŝtadreso P.O. Box 10001, San Diego 10; tel. 224-2169.
San Francisco FD (Instruado): la VD (Burtzloff).

Venezuelo

Valencia (Carabobo) 200.000.
 FD (Naturscienco: orkideoj): Prof. Juan E. Bachrich, Apartado 654.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Lyon, S-ro Charles, Rochester, Usono.
 Rinke, F-ino Herma, Hamburg, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

356. Beaucaire, s-ro L., Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

283. Dimo, S-ro J., 284. Kemp, F-ino F. H., Aŭstralio; 285. De Mot, s-ro René, Belgujo; 286. Souza, s-ro J. B. de Melo e, Brazilo; 287. Livett, s-ro L. G., 288. Sharp, s-ro G., Britujo; 289. Beaucaire, s-ro L., 290. Bepperling-Wolff, s-ino A., 291. Bily, s-ro Harry, 292. Daum, s-ro Hubert, 293. Grundhoff, s-ro Josef, 294. Gründler, s-ro Martin, 295. Kaukal, s-ro W., 296. Knauss, s-ro Wilhelm, 297. Treude, s-ro Wilhelm, 298. Volk, s-ro Friedr., 299. Weber, d-ro J., 300. Wagner, s-ro H., Germanujo; 301. Clark, F-ino Mary A., Kanado; 302. Hardick, s-ro N., Sudafriko; 303. Langmeier, s-ro S., Svislando; 304. Brown, s-ro Allen L., Usono.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO

S-ino E. Burgler-Jezsö, la nuna redaktorino de "La Praktiko", kiu dum multaj jaroj gvidis TEJO-n kun entuziasmo kaj persisto, estis la unua, kiu tuj reagis al la alvoko en "La Juna Vivo" de majo (p. 94). Komprenante la gravecon de la laboro de TEJO ŝi donacis por ĝi 300,— gld. Nian aparte koran dankon pro tiu belega gesto!

DONACIOJ AL GENERALA KASO (Gld.)

Kosutek, s-ro J. 11,—, Aŭstralio; Dorsay, s-ro Elmer S. 13,90, Francujo; Bepperling, s-ino A. 8,10; Bily, s-ro H. 3,60; Gentner, s-ro A. 0,90; Haferkorn, s-ro R. 0,90; Lowitzer, s-ro F. 2,70; Richter, s-ro E. 5,40; Thasler, s-ro F. 1,80; Treude, d-ro W. 17,42, Germanujo; Martin Gomez, s-ro M. 2,10, Hispanujo.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Behrmann, s-ro H. 3,96; Schulte, s-ro F. 5,40, Germanujo; Bohigas, s-ro A. 1,02; Stelo de Paco 2,04, Hispanujo; Urbaitis, Sac. P.M. 7,16, Italujo; Mosley, s-ino M. C. 75,90, Kanado.
Sumo entute ricevita: 16.353,50 gld.
Sumo elspezita: 15.928,90 gld.
Saldo pozitiva: 424,60 gld.

FONDAJO CANUTO

Lapenna, prof. Ivo, Britujo: 4 MA.
Laitinen, s-ro Eero, Finnlando: 1 MA.
Albault, d-ro A., Francujo: 1 MA, 1 J-MA.
Becker, s-ro Günther, Germanujo: 5 J-MA.
Sadler, d-ro V., Nederlando: 5 MA.
Vermaas, f-ino M., Nederlando: 5 MA.
Wulfers-Meddens, s-ino J. H. M., Ned.: 1 J-MJ.
Carlén, s-ro Eric, Svedujo: 3 MA, 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto, omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 30-a de Aprilo

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2475	104,65
2. Svislando	1800	1670	92,78
3. Francujo	7009	6066	86,55
4. Britujo	6053	5183	85,63
5. Usono	3827	3260	85,18
6. Belgujo	1770	1420	80,23
7. Hispanujo	2804	2130	75,96
8. Nederlando	5140	3685	71,69
9. Brazilo	3411	2427	71,15
10. Svedujo	6190	4025	65,02
11. Italujo	3932	2435	61,93
12. Danlando	2704	1650	61,02
13. Japanujo	3745	2130	56,88
14. Norvegujo	1490	835	56,04
15. Jugoslavio	3295	1530	46,43
16. Germanujo	6551	2205	33,66

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	1200	110,09
2. Aŭstralio	1288	1138	88,35
3. Islando	250	185	74,—
4. Sudafriko	250	185	74,—
5. Kanado	702	510	72,65
6. Nov-Zelando	1195	795	66,53
7. Madagaskaro	250	110	44,—
8. Israelo	405	175	43,21
9. Argentino	760	275	36,18
10. Urugvajo	250	65	26,—
11. Portugalujo	380	40	10,53

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Kontrolkomisiono pri lernolibroj celas apogi la verkadon de bonaj lernolibroj. La Komisiono trastudas la manuskriptojn kaj donas eventualajn konsilojn kaj rekomendojn. Adreso S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Liberigu vin el la ĥaosa influo de niaj naciaj lingvoj per "Raciaj Derivo kaj Verbuzo" de Emilo Gasse, necesega aldonajo al ĉiuj nunaj lernolibroj. st. 2,20 + afranko. Ĉe UEA kaj ceteraj libroservoj.

Piedkuracisto deziras kontakti kun esperantistoj samfakuloj kaj aliaj interesitoj, precipe en Francujo, Germanujo, Pollando. Bv. skribi al D-ro Frank Murphy, 9 Ferndale Crescent, Weston Estate, Macclesfield, Cheshire, Britujo.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Fakto estas, ke la vivo, la universo kaj ni mem ekzistas. Konsekvenco kaj same reala fakto estas, ke tiuj realaĵoj ekzistas laŭ iu maniero. Sur tiuj faktoj baziĝas logika vivkoncepto. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F.

Gelernantoj de Esperanto-societo deziras korespondi kun gejunuloj-komencantoj pri ĉiuj temoj. Adreso: Esperanto-societo Požarevac, Jugoslavio.

Profir Zlatkoviĉ 26-jara oficisto, Požarevac, str. Bratstva Jedinstva 22, Jugoslavio, deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi gramofondiskojn, PM, PK kun gesamideanoj el la tuta mondo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Informa Servo de Kobe Esperanto-Asocio (88, 3-chome, Yamamoto-dori, Ikuta-ku, Kobe, Japanujo) urĝe bezonas freŝajn novaĵojn pri Esperanto ie ajn por la regula informado per gazetaro. Eldonantoj de turismaj prospektoj k.s. estas afable petataj sendi po 3 ekz. por transdoni al la ĉefaj gazetoj, ankoraŭ ne gajnitaj por nia afero. Kosto de afranko per aviadilo estos repagita, se indikite.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn de nia movado per korespondado. Petu detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Uneskanoj Esperantistoj Tutmondaj: Ni urĝe petas vian helpon al Aŝiya Unesko, informante pri viaj efektivaj agadoj, konsiloj kaj sugestoj. Kompensota nepre respondo. Anticipan dankon! (Uneska Domo, 30, 1-chome, Okuyama-cho, Asiya, Hyogo-ken, Japanujo).

esperanto
junio 1965

ESPERANTISTA KAMPADEJO PRIMOŠTEN

ĉe la bordo de
Adriatiko
invitas vin.

Venu
vi ĝuos
lazuran maron
mediteranean klimaton
esperantistan etoson
unikan turistan observatorion.

Loĝebleco
sub tendo
en privataj domoj
en vilaostilaj hoteletoj.

Prezoj nealtaj. Kompleta pensiono kostas de
2 ĝis 4 kaj duono da usonaj dolaroj por ĉiu
tago kaj persono, depende de la sezono kaj
elektita loĝloko.


Esperantistoj ĝuas rabaton.

Ĉiujn informojn donas:

Internacia Esperanto-kampadejo **PRIMOŠTEN**
ĉe Šibenik

Jugoslavio

LEGU



de UEA - jarabono (4 n-roj) 15,- gld.

Ekde 1965 aperas en granda formato. Abonu nun!


Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura

Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p.
luksa
prezento



\$ 2,50
9,— gld.
36 st.

*"Kiam venis Enciklopedieto Japano, mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ super-
ebla. Sed jen La Libro de Teo ĝin superatutis!"*

Juan Régulo-Pérez

Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA

LEGU !

antaŭ la vojaĝo al Vieno

"VIENAJ LEGENDOJ"-N

44 paĝoj 4 steloj

dum la veturado al Vieno

"DISTRA KOKTELO"-N

128 paĝoj 10 steloj

Mendojn akceptas la organiza komitato de
"Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965", Wien,
XV. Fünfhausgasse 16, Aŭstrio.

GAZETOJ SERĈATAJ :

LA REVUO: N-roj 62, 64-68, 70-71, 74, 80-82, 96.
Enhavtabelo por vol. IV, VIII.

LA NOVA EPOKO: sept. 1931 n-ro 96
febr. 1933 n-ro 102

LITERATURA MONDO: Enhavtabelo por 1935

Ofertojn petas: Ladislao Somlai
Budapest, V.
Bajcsy Zs. ut 40

Ĉu vi serĉas revuon

*kiu enhavas interesajn artikolojn pri
popularaj temoj,*

kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,

kiu vere "instruas kaj amuzas"?

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

La administra maŝino de Universala Esperanto-Asocio kaj la redaktado de s-ino E. Burgler-Jezsó garantias regulan, akuratan aperadon kaj aktualan enhavon.


Jarabono 1965: 10,— gld. (40 steloj). Kotizu per via kutima peranto, aŭ rekte al UEA.

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Mihail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj verkoj
en Esperanto

Moderna plasta kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

kun leda dorso 35,— gld (140 st)
tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

POSTKONGRESA AMIKA RONDO EN HONG KONG

Esperantistoj, kiuj ŝatus viziti Hong Kong post la 50-a Kongreso estas petataj sin anonci al s-ro D. M. Brink, la Delegito, kiel eble plej frue. La amika renkonto okazos je la 12-a ĝis la 15-a de aŭgusto.

Oni aranĝas loĝadon en Hotelo
AUGUST MOON, je la jenaj prezoj:


Lito kaj matenmanĝo (en unulita ĉambro) nokte	\$5 U.S.
Lito kaj matenmanĝo (en dulita ĉambro) nokte	\$8 U.S.
Vespera festmanĝo (ĉina manĝaĵo) sabaton 14/8/65 po	\$5 U.S.
Duontaga ekskurso (Hong Kong) po	\$4 U.S.
Duontaga ekskurso (Novaj teritorioj) po	\$4 U.S.

Por mi la nomo signifas Kvalito !


ANTAŬ KELKAJ NOKTOJ, veturante hejmen, malfrue kiel kutime, mi ekrimarkis ke la stratlumigo estas pli brila. Kaj hieraŭ mi legis en la gazeto ke Philips instalas ĝin. Por la unua fojo mi eksciis ke Philips produktas ankaŭ stratlumigilojn. Vere, oni lernas ĉiutage!



KIE MI LABORAS NI UZAS PROJEKCILOJN DE PHILIPS. Elstaraj ekzemploj de moderna faksperteco. Kaj sciu, pri kino-projekciiloj ne ekzistas por mi sekretoj. Ekipaĵoj de Philips estas uzeblaj en preskaŭ ĉiuj modernaj kino-sistemoj.



KIAM MI DECIDIĜIS AĈETI MAGNETOFONON por mi mem, jam antaŭe mi sciis kiun markon prefere akiri. Philips, kompreneble! Tute kiel mi atendis, la funkciado estis sendifekta kaj ĝia manipulado facila. Krome, mi estas ĉiam certa pri bonega teknika servo, kiun Philips, ĉie en la mondo, metas je dispono.



fido al **PHILIPS** estas tutmonda

Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.

